

IL POPOLA CINIO

中國報通

1 1986





Floroj

Enhavo

Al la legantoj	2
POR LA 71-A UK:	
La unua mesaĝo	3
Unua oficiala komuniko	18
Naŭ belaj tagoj en Ĉinio	16
Hans Andersen en Ĉinio	20
POR KOMENCANTOJ: Por savi infanon	48
ESP-NOVAĴOJ	23
La "verda granda muro" en konstruado	5
MALFERMITAJ URBOJ: La antikva havenurbo Ningbo	12
Reformado de alkala tero	39
La Haleja kometo aperas refoje	41
Postleciona laborado de ĉinaj studentoj	43
Korpokonstrua turniro de Ĉinio	25
Ĉinaj sportistoj en la Kvina Mondpokala Konkurso de Akrobataĵa Gimnastiko (Bildoserio)	28
Konkurso de malgrandaj pianistoj	46
MIKRONOVELOJ:	
Domastro for de l' okuloj	50
Novicoj	49
Korban-festo de uĝuroj (Bildoserio)	57
VOJAĜO TRA ĈINIO: Daljan bonvenigas vin	31
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Legendo pri la birdo <i>feng</i>	36
Antikvaj ŝipoj de Ĉinio	55
Afriko batalas kontraŭ dezertiĝo	64
EL REALA VIVO DE ĈINIO (Bildoserio)	60
KURANTAJ AFEROJ	51
AMUZO	67
ĈINLINGVA KURSO	67
SUR LA KOVRILO: Ludo kun leono (Papertranĉaĵo)	de JOŬ FU
SUR LA DORSKOVRILO: Monumento en Tajhang-monto (Ĉinstila pentraĵo)	
INTERNE DE LA KOVRILO: Floroj	
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Bronza kruĉo kun ora inkrustaĵo farita en la periodo de Militantaj Regnoj	Foto de LŬO ŬENFA

Al la legantoj

Ĉe la sojlo de la jaro 1986 ni adresas novjaran saluton kaj bondezirojn al niaj karaj legantoj, kontribuantoj, perantoj kaj amikoj, kiuj subtenas nian laboron.

La pasinta jaro estis jaro memorinda por ni. En tiu jaro ni festis la 35-jaran jubileon de nia revuo. Nian festadon ĉeestis UEA-representanto s-ro Ian Curzon Jackson kaj aliaj 12 gesamideanoj el malproksimaj landoj. Multaj el niaj legantoj kaj amikoj skribis al ni por gratulo. Pro tio ni kore dankas ilin. Iliaj varmaj vortoj, belaj deziroj kaj esperoj estas granda kuraĝigo por ni. Ili helpis nin klare vidi la valoron de nia laboro kaj pli profunde kompreni la devon, kiun ni devas plenumi por nia Esperanto-movado.

Samtempe ni rerigardis la vojon, kiun ni iris dum la pasintaj 35 jaroj. Ĝuste kiel ni iam montris, nia revuo bone progresis iutempe kaj suferis repuŝojn alitempe pro nia malĝusta redakta orientilo kaj eraro en laboro. Sed post kiam ni faris reformojn antaŭ kelkaj jaroj kun subteno de niaj en- kaj eksterlandaj kontribuantoj kaj legantoj, nia revuo suriris vojon de sana disvolviĝo kaj nia nova redakta orientilo ricevis ilian aprobon. Tial ni decidis daŭrigi nian laboron laŭ la nuna orientilo. Kompreneble la socio antaŭeniras. Nun komenciĝas la informa socio. Por ke nia revuo ludu pli grandan rolon en komunikado de informoj pri Ĉinio kaj Esperanto-movado, ni senĉese

renovigos nian revuon kaj rebonigos nian laboron.

La jaro 1986 estos jaro neordinara por ni, ĉinaj esperantistoj. Ĉi-jare ni estos gastigantoj de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto. Ni ankaŭ tre ĝojas, ke nia revuo havos ŝancon servi al la kongresanoj el diversaj mondpartoj. Sub la nova rubriko "Por la 71-a UK" ni aperigos artikolojn pri la prepara laboro de LKK kaj rilataj detaloj. Ni multe raportos pri la kongreso tuj post ĝia fermo.

Pasintjare nemalmultaj legantoj skribis al ni por laŭdi nian laboron kaj fari trafajn kritikojn kaj proponojn. Ni dankas ilin pro ilia zorgo kaj subteno al nia revuo, kiujn ni rigardas kiel movforton de nia revuo. Por laŭeble kontentigi niajn legantojn, ni ne nur pliriĉigos la temojn de nia revuo, sed ankaŭ starigos la novajn rubrikojn "Ĉina Literaturo" kaj "Amuzo". Ekde la kvara numero ni prezentos famajn ĉinajn verkistojn, iliajn verkojn kaj skolojn en la historio de la ĉina literaturo, kaj pro la limigitaj paĝoj ni povos publikigi nur pecojn de iliaj ĉefverkoj se ili estas longaj. En la rubriko "Amuzo" ni distros niajn legantojn per humuraĵoj, enigmoj, vortludoj k.a. Por konigi la vivon kaj morojn de la ordinaraj ĉinoj, ni aldonos la foto-rubrikon "El Reala Vivo de Ĉinio". Ni ĝojos, se la supraj rubrikoj certagrade kontentigos la deziron de niaj legantoj.

LA RED.



La unua mesaĝo

— La 71-a UK en preparado

de nia raportistino **ŜAŬ BIN**

Nun laborantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) faras streĉan preparadon por la 71-a UK, pri kio konigis al mi Ĝang Ĉjiĉeng, ĝenerala sekretario de ĈEL.

Koncerne al la subteno de la ĉina registaro al la kongreso, li diris, ke jam en 1963 Ĉen Ji, la tiam vicĉefministro kaj ministro de la Eksteraj Aferoj, montris sian deziron, ke okazos UK en Pekino, kaj kuraĝigis la ĉinajn esperantistojn fari necesajn kondiĉojn por tio. Dum la pli ol 20 jaroj la tuta personaro de ĈEL bone tenas lian kuraĝigon en la memoro. Post kiam ĈEL fariĝis landa asocio de UEA en 1980, estraranoj de UEA intencis okazigi tian kongreson en Ĉinio kaj proponis, ke pli bone ĝi okazu en 1986. Post longa konsidero, ĈEL prezentis sian ideon okazigi UK en Ĉinio al la ĉina registaro, kiu bone scias la rolon de Esperanto en la internacia komunikado. Kompreneble, ĝi esprimis sian aprobon. Sekve, la estraro de UEA faris decidon okazigi la 71-an UK en Pekino, kaj oficiale publikigis tiun decidon en la 69-a UK. Ekde tiam ĈEL komencis preparadon por la kongreso.

Koncerne la Lokan Kongresan Komitaton de la 71-a UK kaj ĝian laboron, li diris, ke en la komenco de 1985 fondiĝis la komitato.

Ĝia prezidanto estas Jelezo, vicprezidanto de ĈEL, ĝiaj vicprezidantoj — fama lingvisto Ĉen Jŭan, fama verkisto Chun-Chan Yeh kaj Ĝang Ĉjiĉeng. Ĝia ĝenerala sekretario — Zen Hojaŭ, vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, kaj ĝia sekretario — Daj Song'en, konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo. Krome, en LKK estas ankaŭ aliaj membroj respondecaj pri aranĝo de la kongresejo, literaturo kaj arto, turismo afero, informo ktp. Fondiĝis ankaŭ ĝia Honora Komitato. Ĝia prezidanto estas Hŭang Hŭa, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso, ĝiaj vicprezidantoj — Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, kaj Ĉu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanto de la societo Amikoj de Esperanto. Peng Ĝen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso, funkcias kiel alta protektanto de la kongreso. Dum preparado por la 71-a UK Hŭang Hŭa varme intervidiĝis kun du reprezentantoj de UEA kaj faris kun ili amikecan interparoladon. Ankaŭ Lju Ĝiŝjan, vicministro de Kulturo, akceptis

ilin kaj esprimis sian subtenon al la kongreso. Por esprimi la amikan senton de la urbanoj de Pekino al ĉiulandaj esperantistoj, Ĉen Ŝjitong, la urbestro de Pekino, skribis speciale salutvortojn en la unua bulteno de la kongreso. Ankaŭ la koncernaj instancoj de Ĉinio esprimis sian subtenon al la kongreso. Ekz., la Civila Aviada Administracio de Ĉinio decidis havigi avantaĝon al la esperantistoj, kiuj veturos al Ĉinio per ĉinaj aviadiloj por la kongreso. Ankaŭ la Internacia Turisma Servo de Ĉinio volonte servos al la partoprenantoj per loĝado, vojaĝado kaj trafikado.

S-ro Ĝang Ĉjiĉeng diris, ke ĉinaj esperantistoj faras aktivan preparon por la 71-a UK, kiun ili de longe deziras. Antaŭ ĉio, ili ekzercas sin en konversacio kaj provprezantas amuzajn programecojn. Sed ne ĉiuj esperantistoj povos ĉeesti la kongreson kaj sufiĉe multaj esperantistoj devos resti ĉeloke kaj gastigi la alilandajn samideanojn.

La ĝenerala sekretario diris al mi, ke ĝis nun pli ol mil esperantistoj anoncis sin por la 71-a UK. Tio montras, ke ili havas grandan intereson pri la kongreso. Laŭ li, ke la 71-a UK okazos en Ĉinio, tio havos gravan signifon. Ĉinio

estas civilizita lando kun longa historio, brila kulturo kaj granda loĝantaro. Kun disvolviĝo de la moderniga konstruado Ĉinio ludos pli kaj pli aktivan rolon en la internaciaj aferoj. Nun la Esperanto-movado de Ĉinio troviĝas en senprecedence bonega situacio. La daŭra disvolvo de la situacio akcelos la mondan Esperanto-movadon. Tial s-ro Gregoire Maertens, prezidanto de UEA, certigis, ke la Pekina Kongreso havos strategian signifon kaj la kongreso metos ponton inter la kulturo orienta kaj la okcidenta.

“Tamen,” aldonis Ĝang Ĉji-ĉeng, “la lingva nivelo de ĉinaj esperantistoj estas ne alta kaj la materiaj kondiĉoj de Ĉinio estas ne bonaj, kio postulas la tutan personaron de LKK venki ĉiajn malfacilojn por la longe dezirata kaj signifoplena kongreso. Ju pli malfacila estas la tasko, des pli grandan klopodon ni devas fari, por ke la kongreso havu influon internacie, akcelu la mondan Esperanto-movadon kaj servu kiel ponto por interŝanĝi la kulturojn orientan kaj okcidentan. Iuj opinias, ke la 71-a UK estos la preludo por festi la centjaran jubileon de la naskiĝo de Esperanto. Ni devas ne vanigi la esperon de la tutmonda esperantistaro kaj faru ĉion eblan, por ke la kongreso atingu sian deziratan celon.”

Fine s-ro Ĝang diris: “Ni paŝo post paŝo efektivigas ĉiujn aranĝojn de la kongreso kion ni informos al niaj legantoj per la revuo EPC. Ni bonvenigas diverslandajn esperantistojn ĉeesti la kongreson, konatiĝi kun pli da amikoj en la antikva ĉefurbo Pekino, koni la ĉinan kulturon kaj ĝian nunan staton kaj plue plifortigi la kompreniĝon kaj amikecon inter la ĉina popolo kaj la alilandaj popoloj.

ABONU “EL POPOLA ĈINIO”!

Nun komenciĝas 1986-a abonvarba kampanjo por EL POPOLA ĈINIO. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1985 10 01 ĝis 1986 02 28), ricevos Esperantan kalendaron. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

ABONTARIFO DE EPC

(Ekvalidas de 1-a de Oktobro)

Lando	Valuto	1 jaroj	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	14.00	24.00	34.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	500	900	1300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	13.00	22.00	30.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00

**VARBILON KAJ SENPAGAN SPECIMENON
NI SENDOS LAŬ PETO.**

La "verda granda muro" en konstruado

Por rezisti kontraŭ agresado antikvaj ĉinoj per brikoj kaj ŝtonoj konstruis la Grandan Muron, kiu, kiel miraklo de la mondo, enkorpigis la spiriton de la ĉina nacio. Kaj hodiaŭ iliaj posteuloj, por rezisti kontraŭ la atako de sablovento, per arboj kaj herboj konstruas la verdan grandan muron kaj kreas pli grandan miraklon, t.e. la sistemon de la forsto-ŝirmzono etendiĝanta de nordokcidenta Ĉinio, tra la nordo de norda Ĉinio, ĝis la okcidento de nordorienta Ĉinio (la Tri Nordoj en mallongiĝo). La konstruo havas strategian signifon en rezistado kontraŭ la sablovento kaj serioza grunda erozio en la norda parto de Ĉinio.

La regiono Tri Nordoj ampleksas ĉ. kvaronon de la teritorio de Ĉinio (vd. bildon). Ĝi sin etendas 7 000 km. en 12 provincoj, municipo kaj aŭtonomaj regionoj. Ili estas la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj parto de la provincoj Ĉinghaj, Gansu, Ŝenŝji, Ŝanŝji, Hebej, Ljaŭning,


Ĝjilin kaj Hejlongĝjang, la aŭtonomaj regionoj Ŝinĝjang kaj Ningŝja kaj la municipo Pekino. La regiono kun areo de ĉ. 260 milionoj da hektaroj ampleksas 396 guberniojn (hoŝojn) kun 44 milionoj da kamparaj loĝantoj.

En la regiono troviĝas 127 milionoj da hektaroj da dezerto kaj etendiĝas sabloventa linio longa ĉ. 5 000 km. Fakte, en la historio la regiono ne estis tia, kia ĝi estas hodiaŭ. Historiaj verkoj diris, ke en la dinastioj Ĉin kaj Han (221 a. K. —220 p.K.) en Gansu-provinco altaj arboj kovris kelkajn prefektujojn kaj la arboj kreskis ĉie. En Ĉingdinastio (1644—1911p. K.) ĉie en la mezo de la provinco videblis altaj arboj kaj fluis klaraj riveretoj. Kaj en la dinastioj Ĵuan kaj Ming (1279—1644 p. K.) la norda Ŝenŝji kaj la dezerto Mu Us de la Interna Mongolio estis famaj paŝtejoj. En la 17-a jarcento Korsin-sabloloko de la Ebenaĵo Ŝjiljaŭhe estis ankoraŭ loko kun arbaroj, stepoj, rive-

Oficistoj de la Monda Grena Programo kaj grenhelpaj landoj en forstozono starigata en Sjiĝji en Ningŝja



SKEMA MAPO DE
LA FORSTOZONA
SISTEMO EN OK-
CIDENTA, NORDA
KAJ NORDORIENTA
ĈINIO



1. Urumĉi
2. Ŝjining
3. Jinĉŭan
4. Langŝoŭ
5. Ŝjian
6. Tajjŭan
7. Huhhot
8. Pekino
9. Ĉangĉun
10. Harbin
11. Senjang

roj kaj lagoj. Tamen, militoj, senbrida arbohakado kaj neracia utiligo de naturaj riĉfontoj en agrikulturo dum longa tempo kaŭzis al la arbaroj seriozan detruon. Rezulte, jaron post jaro tie okazis katastrofoj de sablovento, grunda erozio, inundo kaj trosekeco. Iuj famaj historiaj urboj sur la antikva Silka Vojo estis de longe englutitaj de dezerto. La kampoj kaj paŝtejoj de 213 gubernioj estis minacataj de sablovento. La eroziita areo de la Leŭsa Altebenaĵo atingis 0.43 milionon da kvadrataj kilometroj, kio damaĝis agrikulturan kaj brutobredan produktadon. Ĉiujare la Flava Rivero forportis 1.6 miliardojn da tunoj da tero, tiel ke ĝi fariĝis 'pendanta rivero' super la tersurfaco, kiu

minacis la vivon kaj riĉaĵon de la popolo ĉe la malsupra baseno de la rivero.

Tuj post la fondiĝo la Ĉina Popola Respubliko faris protektadon de la ekologiaj medioj. Februaron de 1950, la tiama Nordorienta Popola Registaro mobilizis milionojn da popolanoj de 26 gubernioj (hoŝoj) por konduki grandskalan forstumadon. En 1952 nordokcidenta Ĉinio komencis konstrui kontraŭsablajn forstozonojn, kiu etendiĝis de Julin de Ŝenŝji en la oriento ĝis Ĝiŭĉjŭan de Gansu en la okcidento kaj estis pli ol 3 000 km. longa. Kaj de post tio, neniam ĉesis la forstokulturado en la norda parto de Ĉinio. Por radikale ŝanĝi la staton, ke en la regiono Tri Nordoj man-

Sablofiksa forstozono en Ganggutaj, Ljaŭning-provinco




kas arbaro kaj akvo kaj perturbiĝas la ekologia ekvilibro, la ĉina registaro decidis novembre de 1978, ke oni konstruos sistemon de granda forstozono en la regiono. Ĝi estis ne nur subtenata de diversnaciaj popoloj de Ĉinio, sed ankaŭ zorgata de aliaj landoj. La internacia publiko laŭdis, ke Ĉinio komencis grandan faron por reformi la naturon. Multaj el la afrikaj landoj plurfoje sendis fari esploron en Ĉinio. Iuj eksterlandaj amikoj sendis siajn gratulajn leterojn kaj monon por helpo al Ĉinio.

La konstruado estis farata en kelkaj etapoj. En la unua etapo inter 1978-1985, laŭ la plano oni devis kulturi 5.94 milionojn da hektaroj da arbaroj. Ĝi estis granda protekta sistemo el forstozonoj, forsto-retoj kaj arbaraj parceloj, konstruitaj en diversaj lokoj laŭ ties naturaj kondiĉoj. La unuaetapa konstruado estis farata ĝenerale en dupecaj lokoj: sabloventaj lokoj kaj tiuj de grunda erozio. Laŭ malsamaj naturaj kondiĉoj oni konstruis kampoprotektajn forsto-retojn aŭ forstozonojn en kampoj kaj paŝtejoj atakataj de sablovento, ĉe la sablomoviĝa regiono oni konstruis sablofiksajn forstozonojn kaj forstumajn parcelojn. Kaj en la grunderozia regiono de la Leŭsa Altebenaĵo, oni plantis arbidojn de arbaro por konservi akvon kaj grundon, brulaĵa arbaro, ekonomia arbaro kaj porligna arbaro en parceloj kaj zonoj laŭ riverbasenoj, montoj kaj valoj.

Post komenciĝo de la arbarizado, en la regiono Tri Nordoj iris senprecedenca amasa aktivo de arbarizado, kiu atingis ĝojigan sukceson. Dum la sep jaroj oni arbarizis 5.7 milionojn da hektaroj, 1.4 milionojn pli multe ol la totala areo de la du projektoj mondfamaj: la sovetunia plano de Stalin por reformi la naturon kaj la usona forstozono de Theodore Roosevelt. Nun la ĉefa parto de la unuaetapa kampoprotekta forstozono de la verda granda muro jam havas rudimentan

formon. Aperas regionaj sistemoj de grandaj kampoprotektaj forstozonoj unu post alia. En la okcidenta parto de la Nordoriento, la orienta parto de la Interna Mongolio, la norda parto de Hebejprovinco, la irigaciata regiono okcidente de la Flava Rivero en Gansu-provinco, la irigaciata regiono de Jinĉuan en Ningsĵa, la irigaciata regiono de la Granda Kurbiĝo de la Flava Rivero en la Interna Mongolio kaj la oazo de Ŝinĝjang estas arbarizitaj sume 6.7 milionoj da hektaroj da tero, t.e. 53.8% de la totala areo de la kampoj arbarizendaj en la supre menciitaj regionoj. La arbara reto de ĉ. duono de la kampoj komencis ludi rolon



Kanalo, protektata de kontraŭventa forstozono en Dingbjan, Ŝenŝji-provinco



Ruĝvertaj gruoj en kontraŭventa forstozono en Ĝjilin-provinco

protektan kaj kreis favorajn kondiĉojn por pliprodukto de agrikulturaj plantoj. Pro kontinua arbarizado Ĝingbjan-gubernio de Ŝenŝji-provinco havas arbarizitan areon de 160 000 hektaroj. Nun la arbaroj kovras 34% de la totala areo de la gubernio, sed ĝiaj arbaroj estis nur 1.3% en la komencaj jaroj de la nova Ĉinio. Nun ĉie en ĝi regas verdeco kaj formiĝis regiona forsta sistemo kun arbaraj zonoj, parceloj kaj retoj. Sciencistoj konstatis, ke en la gubernio, la venta rapideco en la kampoj protektataj de arbaraj retoj reduktiĝas meznombro je 20%-30%, la vaporiĝa kvanto de la tersurfaco malgrandiĝas je 10%-20% kaj la relativa humideco en la aero altiĝis je 5%-10%. Pro la forsta protektado la grena produktokvanto de la gubernio kreskis de ĉ. 30 000 tunoj en la 60-aj jaroj al ĉ. 50 000 tunoj en la nuna tempo.

En la regiono Tri Nordoj ĉiuj gubernioj kaj hoŝoj, kie estas serioza la grunda erozio, grand-skale plantas herbojn kaj arbojn kaj faras sintezan kontraŭrimedon en malgranda riverbaseno. En la basenoj de la kvin riveroj, kiuj fluas tra 43 gubernioj kaj hoŝoj de la provincoj Ŝenŝji, Ŝanŝji, Hebej kaj Ljaŭning kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, oni plantis en la lastaj jaroj 442 000 hektarojn da herboj kaj arboj, kiuj kovras nun 18.6% de la areo, kio estis 12.3% en la pasinteco. La areo de grunda erozio jungita atingis 8.43 milionojn da hektaroj, kiuj konsistigis 11.5% de la totala grundo-eroziita areo. Rapide progresis plantado de kontraŭventaj kaj sablofik-saj arboj en sabloventa regiono. Jam kunligiĝis la arbaroj en la du sablolokoj Korsin kaj Mu Us. Sole en sep gubernioj de Julin-regiono de Ŝenŝji oni plantis en ses jaroj 92 000 hektarojn da sablofik-saj arboj. Ĉe la rando de la dezertoj Tenggeli kaj Badanĝjilin la areo de la kontraŭventaj kaj sablofik-saj arbaroj plivastiĝas. La ekologia sistemo en nemalmultaj lokoj iom post iom transiras de la maligna cirkulo al la normala.

En la konstruo oni trovis novan vojon por konstrui ĉinajn kampo-protektajn forsto-zonojn "ĉefe per propraj fortoj, helpate de la ŝtato". Dum la ok jaroj la ŝtato asignis al la konstruo 300 milionojn da jŭanoj (ĉ. 3 jŭanoj egalas unu usonan dolaron). Kalkulate laŭ arbarizita areo al ĉiu hektaro estis investitaj ĉ. 45 jŭanoj. La monsumo eĉ ne kovras la koston de arbidoj. Kun monsumo de la bazaj unuoj, al ĉiu hektaro estis investitaj meznombro malpli ol 450 jŭanoj. Imageble, kiom grandan oferon faris la vasta popolamaso por konstrui la forsto-zonojn! La Interna Mongolio,

kiu portas la plej grandan taskon, forstumis areon de 670 000 hektaroj en 1984, inter kiuj 67% estis plantitaj de kamparanoj. En Ŝjiŝan-regiono de Ŝanŝji-provinco dekono de kamparanaj familioj funkciigas familian forstokulturejon. La tieaj kamparanoj kontraktas pri 800 000 hektaroj da dezertaj montoj, inter kiuj 300 000 hektaroj estis arbarizitaj.

Dum la arbarizado la tieaj arme-garnizonoj, fervojaj unuoj, karbominejoj, fabrikoj, institucioj kaj lernejoj senescepte prenis la arbarizadon kiel honoran laboron. En ĉiu arbariza sezono ĉiuj volonte faris sian kontribuon al la konstruado.

Antaŭe Ĉinio ne havis sperton pri konstruado de kontraŭsabla arbaroj, ankaŭ aliaj landoj ne havis tiuflankan sperton por nia referenco. Sed en la amasa praktikado naskiĝis granda kreivo. La principo de la kvar kombinoj sekvata en la unuaetapa konstruado de la forsta sistemo en la regiono Tri Nordoj estis naskita surbaze de la multjara praktikado de milionoj da popolanoj. La principo estas jene: Kombino de arboj, arbus-toj kaj herboj; kombino de arbaraj retoj, parceloj kaj zonoj; kombino de pluruzaj arbaroj (kontraŭ-venta forsto, porbrulaĵa arbaro, porligna arbaro, frukto-, nukso- kaj oledon-arbaro, akvokonserva arbaro kaj apuddomaj, apudvojjaj arboj kaj kombino de plantado de arboj kaj herboj kaj protektado de la malnovaj arbaroj. La kvar kombinoj riĉiĝis al la homaro sciojn pri batalo kontraŭ la naturo kaj prezentis al ĉiuj landoj utilan sperton pri batalo kontraŭ dezerto.

En 1986 komenciĝos la duaetapa konstruado de 5 jaroj. Oni forstumos laŭplane ses milionojn da hektaroj, 60 % de la nove plantitaj arboj devos esti vivigitaj. Krom la ĉefaj forstaj taskoj difinitaj de la provincoj, municipo kaj aŭtonomaj regionoj en la Tri Nordoj, la duaetapa konstruado devos plenumi aliajn tri gravajn taskojn, t.e. la kontraŭsablajn forsto-zonojn laŭ la fervojoj inter Pekino kaj Baŭtoŭ kaj inter Baŭtoŭ kaj Lanĝoŭ, la forsto-zonojn de la duon-dezertoj Korsin kaj Mu Us. La tri taskoj koncernas 69 urbojn, guberniojn kaj hoŝojn de naŭ provincoj kaj aŭtonomaj regionoj. Post la efektivigo de la konstruado rimarkinde ŝanĝiĝos la regiono Tri Nordoj.

Estos antaŭvideble, ke certe estos radikale neniigitaj la sablovento kaj grunda erozio en la nordo de Ĉinio, se nur la konstruado de la kontraŭsabla forsto-zonoj estos daŭrigata etapon post etapo.



Nova urbo ĉe Tengge-dezerto de Gansu

Arboj kreskas ĉie en la irigaciata regiono de la Flava Rivero en Ningŝja






Eksterlandaj turistoj vizitas kontraŭventan forstozonon ĉe Hŭojan-monto en Ŝinĝjang.

Rizkampoj en forstozono de Julin, Senŝji-provinco





Forstozono en Ĝjilin-provinco



La arbidkultivejo Tabengalan en Fuŝin, Ljaŭning-provinco

Forstozono en Bajanerdeng-paŝtejo de Bairinzŭo-ajmago, Interna Mongolio





Ningbo hodiaŭ

MALFERMITAJ URBOJ

La antikva havenurbo Ningbo

de ĜENG ĜENĜJE

Fotoj de LI ĈUNGENG

La kajo de Bejĉang-haveno



En la Fabriko de Broditaj Vestoj en Ningbo



La haveno Ningbo



Se oni ŝipveturas suden de Ŝanhajo sepdek marmejlojn, oni povas atingi Ningbon, la duan grandan urbon de Ĝeĝjang-provinco ĉe la Orienta Ĉina Maro. Tie la marborda belaĵo kaj la aspekto de suda akvolando formis apartajn pejzaĝojn de Ningbo.

Kiel havenurbo, Ningbo havas longan historion. Jam en Tang-dinastio (618-907 p.K.) ĝi havis komercajn rilatojn kun Koreio, Japanio kaj landoj de sudorienta Azio. Post la Opia Milito inter Ĉinio kaj Britio en 1840-1842 Ningbo fariĝis unu el la kvin komerchavenoj malfermitaj al la Okcidento. Ĉe la komenco de la kuranta jarcento la funkcio de la haveno Ningbo iom post iom estis anstataŭita de tiu de la nove prosperanta haveno Ŝanhajo en la nordo. Nun, kun la starigo de la ŝanhaja ekonomia distrikto, Ningbo, kiel unu el la 10 urboj de la distrikto, fariĝis nova industria kaj komerca urbo kun areo de 9 377 kvadrataj kilometroj kaj

4,81 milionoj da loĝantoj (inkluzive 7 guberniojn).

Nuntempe la haveno Ningbo havas tri havenajn regionojn kun 21 ankrejoj, kies en- kaj elŝipiga kapablo estas 26.7 milionoj da tunoj. La haveno Laŭgang ĉe la rivero Jongĝjang, kiu trafluas la urbon, estas destinita por transigo de materialoj kaj transportado de pasaĝeroj. En la sepdekaj jaroj oni konstruis la Novan Havenon ĉe Ĝenhaj 15 km. for de la urbo. Nun tie estas du karbokajoj, el kiuj unu povas akcepti 10 000-tonelajn ŝipojn kaj la alia 3 000-tonelajn. La naftokajo kun en- kaj elŝipiga kapablo de 20 000 tunoj jam komencis funkcii. La konstruata haveno Bejĉang, ekkonstruita en 1979, 38 kilometrojn for de la urbo, estas la unua moderna ercotransiga kajo de Ĉinio kaj tie povas halti ŝipoj de 100 000 toneloj. Ĝi servas ĉefe al la konstruata moderna ŝtala entrepreno — la Baŭŝan-a Ŝtala Fabriko de Ŝanhajo. Ĉiuj laboroj en la kajo, ĉu ŝarĝado kaj malŝarĝa-

do, ĉu amasigado kaj transportado de varoj, estas plenumitaj de laborantoj en la centra regadejo kun fermcirkvitaj televidiloj. Krome la kajo ekipita per radaro garantias la sekuran albordejon de ŝipoj en ventego kaj densa nebulo. Ĝoŝan-insularo fariĝis natura ŝirmilo de la haveno Bejĉang, kiu estas proksima al Ŝanhajo kaj havas tre bonajn naturajn kondiĉojn. La haveno estas profunda, neglaciiga kaj sendedimenta, ĝia fluo glata, vento kaj ondoj malgrandaj, kaj bordo vasta. Ĉe la marbordo 10 km. longa oni povas konstrui ĉ. 30 akvoprofundajn ankrejojn por 10 000-200 000-tonelaj ŝipoj. Estonte la totala kvanto de en- kaj elŝipigitaj varoj povas atingi pli ol 100 milionojn da tunoj. La konstruata fervojo de la haveno Bejĉang ĝis Ningbo kaj la kanalo inter Ningbo kaj la Granda Kanalo inter Pekino kaj Hangĝoŭ kunligos Ningbon kun la tera kaj akva vojoj de la tuta ekonomia distrikto de Ŝanhajo.


En la pasinteco la industrio de Ningbo estis tre postginta kaj priskribita kiel "tri kaj duona fumtuboj". Nun establiĝis industria sistemo kun tekstila, maŝina, petrolkemia kaj elektronika industrioj kiel la ĉefaj. La totala produktovaloro de industrio en 1984 atingis 9.7 miliardojn da jŭanoj (unu dolaro egalas ĉ. 2.9 jŭanojn). Ningbo ankaŭ estas ĝe-

nerala agrikultura produkto kun grenaj kaj kotona produktaĵoj, funkciigo de urbaj entreprenoj kaj multspeca mastrumado kiel bazo por ĉiuflanka disvolviĝo de agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, kromokupoj kaj fiŝbredado. La abundaj agrikulturaĵoj vigligis la urban kaj kamparan ekonomion kaj metis bonan fundamenton por la indus-

trioj de manĝaĵo kaj prilaboro de aliaj produktaĵoj de agrikulturo kaj kromokupoj.

En la ekstera komerco de Ĉinio la pozicio de Ningbo senĉese leviĝas. La urbo produktas pli ol 300 specojn de eksportaj komercaĵoj, kiuj havas debiton en pli ol 70 landoj kaj regionoj. Inter la eksportaĵoj estas akvokomputiloj, dizelaj generatoroj, kupraj valvoj, kotonaj ŝtofoj, trikitaj subvestoj, nafto, bobenoj, littukoj, metalaĵoj kaj ladmanĝaĵoj kun marko Mejlin, mandarinoj, persikoj, fridigitaj anseroj, mielo, makulfiŝoj k.a. Diversspecaj tekstilaĵoj, broditaj vestoj, filigranoj, ostaj kaj lignaj inkrustaĵoj, ore lakitaj lignaj skulptaĵoj, orkoloraj lakaĵoj, tapiŝoj, matoj, bambuaj plektaĵoj ĝuas renomon en la ĉina kaj internacia merkatoj.

La starigo de la Ningbo-a distrikto por ekonomia kaj teknika disvolviĝo nordokcidente de la haveno Bejĉang estis aprobita de la ŝtato. La distrikto, 18 kilometrojn for de la urbo, havas areon de 3.9 kvadrataj kilometroj. En ĝia orienta parto estas fervojo, kiu iras de la urbo al la haveno Bejĉang, kaj ĝia okcidenta rando tuŝas Jongĝjang-riveron, per kiu



En la Lad-manĝaĵa Fabriko de Ningbo



Speciala ekonomia distrikto konstruata en Ningbo



oni povas veturi al aliaj riveroj de la lando. La havenoj Ĝenhaj kaj Bejĉang estas kunligitaj de ŝoseo kaj servas al mar-trafiko. Nun oni preparas importon de scienc-teknikaj ekipaĵoj por la industrioj malpeza, elektronika, mezurila, elektra, maŝina, kemia, manĝaĵa, vesta kaj starigon de entreprenoj surbaze de ĉina kaj eksterlanda kapitaloj aŭ kunlaboro kaj tiuj administrataj de eksterlandaj komercistoj.

Ningbo estas ankaŭ turisma urbo. En la urbo estas biblioteko Tjanĵige konstruita antaŭ pli ol 400 jaroj. Kiel la plej aĝa biblioteko en Ĉinio, ĝi konservas pli ol 70 000 klasikajn volumojn. Inter ili la plej valoraj estas pli ol 270 specoj de libroj de Ming-dinastio (1368-1644 p.K.) pri loka historio. Multaj el ili estas enlande unikaj. Tiuj libroj estas gravaj literaturaj materialoj por studi la ĉinan antikvan socion, precipe la historion de Ming-dinastio.

La templo Tjantong 34 kilometrojn oriente de la urbo konstruiĝis en la 3-a jarcento. Tiu grandioza antikva templo kovras areon de pli ol 58 000 kvadrataj metroj. Apude kuŝas la templo Aŝoko, fama en kaj ekster lan-

La biblioteko Tjanĵige




En la Fabriko de Ŝtalaj Mezurbendoj de Ningbo entreprenata de Ĉinio kaj Japanio

do pro konservo, laŭdire, de restaĵo de Ŝakjamunio. Ningbo vizaĝas al la transmara monto Putŭo, unu el la kvin famaj budhismaj montoj de Ĉinio. Pro tio Ningbo estas loko nepre necesa por pilgrimantoj irantaj al la monto. Inter la pitoreskaj vidindejoj de Ningbo troviĝas ankaŭ

la templo Baŭĝuo, bone konservita antikva ligna konstruaĵo, la lago Jŭehu, kie renkontiĝis antikvaj literaturistoj de orienta Ĝeĝjang, la lagoj Dongĉjan kaj Cihu kaj la monto Ĝaŭbaŭ staranta ĉe la Orienta Ĉina Maro, kiuj altiras al si en- kaj eksterlandajn turistojn.

La templo Tjantong



Naŭ belaj tagoj en Ĉinio

de MARIA kaj VILMOS BENCZIK (Hungario)

Vojaĝo al Ĉinio nuntempe estas eble la plej varma revo de ĉiuj esperantistoj sur la terglobo. Ja vidi propraokule la landon, kiu posedas tiom da superlativoj, estas vere tre alloga: en Ĉinio vivas kvarono de la homaro, kaj la ĉina popolo havas la plej longan konatan historion. Por esperantisto, t.e. por membro de la plej juna kultura komunumo de la mondo, ĉu povas ekzisti pli granda deziro, ol vidi la hejmlandon de la plej malnova kulturo?

Kaj ekzistas ankaŭ alia kialo por revii pri vizito al Ĉinio. Tiu ĉi

lando antaŭ deko da jaroj travivis tre malfacilan periodon de sia historio. Dum la lastaj jaroj tamen alvenis informoj pri gravaj ŝanĝoj. Oni sentas scivolon: kiaj estas tiuj ŝanĝoj? Esperantaj gazetoj informas pri la amasa lernado de la Internacia Lingvo en Ĉinio — oni sentas la emon propraokule vidi tiujn novajn esperantistojn, kaj mem konvinkiĝi, ke Esperanto vere ne estas ekskluzive Eŭropa afero.

Kaj nutras tiun revon ne lastvice ankaŭ la ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj, kiuj regule alportas al

ni informojn pri la nuntempo kaj pasinteco de Ĉinio, prezentas artisme faritajn fotojn pri mirindaj ĉinaj pejzaĝoj.

Tiu revo pri venontjara vizito al Ĉinio profunde vivis ankaŭ en ni, kiam komence de tiu ĉi jaro atingis nin la afabla invito de la Redakcio de EPC partopreni la jubilean feston de la 35-jariĝo de tiu ĉi prestiĝa revuo. Komprenibile kun granda plezuro ni jesis al la invito, kaj senpacience atendis la 20-an de majo, la tagon de nia alveno en Pekino.

Kaj fine alvenis tiu sopirata lunda tago, kaj ni elpaŝis el la trajno en la stacidomo de Pekino. Tuj en tiu momento ni povis sperti la ĝentilecon kaj gastamon de la ĉinaj samideanoj: nin renkontis tie tri gvidantoj de la Redakcio de EPC samideanoj Ŝju Ŝanŝu, Li Ŝiĝjun kaj Jang Ĵumo.

Multe impresis nin dum la unuaj tagoj en Pekino la granda atento, kiun la ĉinaj aŭtoritatoj donas al Esperanto. La jubilean kunsidon partoprenis vere parada vico de ŝtataj altranguloj. Ilia ĉeesto eĉ ne estis pure protokola: ili vigle interesiĝis pri la diversaj opinioj de la gastoj, kaj trovis la eblon konversacii kun ili. Por ni estis aparta honoro, kiam vicĉefministro Jaŭ Ĵilin dum la bankedo venis al mia tablo por daŭrigi pli frue komencitan sed nefinitan konversacion. Kaj estis granda travivaĵo manpremi kun s-ro Hŭang Hŭa, kiun ni ekkonis per televidĵurnaloj antaŭ multaj jaroj,



La aŭtoroj en la suda ĉina turisma urbo Hangĝoŭ

La aŭtoroj (la unua kaj la dua de maldekstre) en la kunsido aranĝita de EPC-redakcio



kiam li estis la unua UN-representanto de Ĉinio. La momento, kiam li okupis sian seĝon en la Sekureca Konsilio, estis vere historia. . .

Sed estis ne malpli impresaj ankaŭ la kunsidoj kaj akceptoj, kiujn ni havis ĉe diversaj esperantistaj instancoj, kaj ĉe Guoji Shudian. Tiuj kunsidoj konvinkis nin, ke la ĉina Esperanto-movado vere impone evoluas, kaj la ĉinaj esperantistoj kun granda sento de respondeco agadas por la sukceso de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos venontjare en Pekino.

Dank' al la brile planita kaj organizita programo ni havis la eblon ankaŭ turisti en Ĉinio. La unua ekskurso kondukis al la Granda Muro, onidire la sola homa konstruaĵo, videbla ankaŭ de sur la Luno. Ĝi estas vera simbolo de la homa persistemo kaj diligento — oni ne povas ne admiri ĝin, eĉ se oni ne ŝatas la penson nuntempe ĉirkaŭbari ajnan landon per muregoj.

Por ni persone la du kulminoj de la turismaj travivaĵoj en Pekino estis la Malpermesita Urbo kaj la Somera Palaco. La pompo de la palaco-komplekso en la koro de Pekino, kaj la naturharmonie kreitaj konstruaĵoj de la Somera Palaco estas admirindaj, kaj ni rekomendas al ĉiuj partoprenantoj de la 71-a UK nepre viziti ilin!

Ni havis la bonŝancon turisti ne nur en Pekino, sed viziti ankaŭ sudan Ĉinion, nome la urbojn Hangĝoŭ kaj Suĝoŭ, kaj iomete ankaŭ Ŝanhajon.

Sur pluraj paĝoj oni povus skribi pri la beleco de la vidindaĵoj ĉirkaŭ la Okcidenta Lago. La tombo kaj Templo de Jŭe Fej, la Templo Lingjin, la Alfluginta Montpinto, la Pagodo de Ses Harmonioj. . . amaso da belaĵoj, kiuj multege impresis nin. Kaj ne malpli la admirindaj ĝardenoj de Suĝoŭ, kie same ni spertis la altan kapablon de la iamaj ĉinaj arkitektoj, kiuj per siaj konstruaĵoj sciis adaptiĝi al la naturo, kaj ne

spiti ĝin. En tre malmultaj lokoj oni trovas tiel plenan harmonion inter la naturo kaj la homfaritaj konstruaĵoj kiel ĝuste en Hangĝoŭ kaj Suĝoŭ. Kaj la plezuron, kiun ni havis en la ekskursoj, signife pliiĝis la erudiciaj kulturhistoriaj klarigoj de s-ano Li Ŝiĝjun. Promenante kun li, kaj aŭskultante liajn klarigojn ni kvazaŭ refluĝis en la historio mil jarojn. Ni renkontis esperantistojn ankaŭ en Hangĝoŭ kaj Suĝoŭ — nin ravis precipe la renkontiĝo kun la Suĝoŭ-aj esperantistoj: ili estas multaj, tre afablaj kaj tre agemaj.

Nun, ses semajnojn post la reveno (ni prokrastis verki tiun ĉi artikolon por liberiĝi el sub la forta influo de la travivaĵoj kaj reakiri la objektivcon), se ni demandas nin, kio plej multe nin impresis en Ĉinio, senhezite ni eldiras la respondon: la homoj. Ni renkontis tre multajn esperantistojn, kiujn tuj ni eksentis amikoj. Jen, staru ĉi tie almenaŭ kelkaj nomoj hazarde elektitaj: s-anoj Li Ŝiĝjun, Ĝjang Hongĝang, Laŭ Baj, s-ino Tan (EPC),

s-inoj Hang Ĝjun, Ŭang Juĉin kaj s-anoj Nan Joŭli kaj Li Juping (Radio Pekino), kaj pluraj aliaj, kun kiuj ni jam havis la eblon konatiĝi en UK-oj. Ni ne havis la eblon — pro tempomanko — konversacii kun ili tiel longe, kiel ni deziris, sed la konversacioj okazintaj longe konserviĝos en niaj memoroj kaj la spertitaj amikaj sentoj en niaj koroj.

Sed la malfermiteco kaj amikeco ne estis propraĵo nur de la

esperantistoj. La saman amikecon ni spertis ankaŭ en popola (neluksa) trajno inter Hangĝoŭ kaj Ŝanhajo. Simpla ĉino, kiel poste ni eksciis; laboristo, sidanta apud ni kun sia fileto, tuj avido volis konatiĝi kun ni, kaj malgraŭ la manko de komuna lingvo inter ni, post kvin minutoj jam kune ni riĝardis liajn kaj niajn familiajn fotografaĵojn. Kaj ĉe la adiaŭo li diris: "Xiongyali good!" (Hungario bona) — kaj manke de aliaj

vortoj li nur ridetis, sed en tiu rideto pulsas lia koro.

Tiu kaj similaj momentoj pruvigas, ke la Granda Muro ne plu forfermas Ĉinion disde la cetera mondo. Ĉinio komencis novan vivon, kaj tiu vivo aŭguras belan estontecon por la ĉina popolo, en kunlaborado kaj amikeco kun aliaj landoj.

Bonan ŝancon, Ĉinio!

Venontjare ni revenos!

Julio 1985

POR LA 71-A UK

Unua oficiala komuniko

18 10 1985

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: p/a Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, Beijing, Ĉinio

Loka Kongresa Komitato: La LKK konsistas el eminentaj agantoj de la socia kaj esperantista vivo de Ĉinio. Ĝia prezidanto Ye Laishi (Ĵelezo) estas konsilisto de la Ŝtata Komisiono de Reformado de Skriba Sistemo. El la vicprezidantoj Chen Yuan estas vicministro de la sama komisiono. Zhang Qicheng ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo kaj Ye Junjian elstara verkisto. Ĝenerala sekretario estas Zeng Heyao kaj sekretario Dai Songen. La ceteron de la LKK konsistigas Zhu Ming-

yi (kasisto), Zhang Haiping (kongresejo), Gong Peikang (ekskursoj), Li Yuping (artaj aranĝoj), Nan Youli (loĝado), Zou Guoxiang (kultura aranĝoj), Xu Senrong (dokumentoj, ĝiĉetoj), Jiang Hongzhang (junularaj aranĝoj), Hang Jun (gazetara servo), Tan Xiuzhu (eksterlanda informado) kaj Zhang Zai (libroservo).

La kongresa temo: La jaro 1986 estas proklamita de Unuiĝintaj Nacioj la Internacia Jaro de Paco. Por akordigi la enhavon de la kongresaj laboroj kun tio, la Estraro de UEA elektis kiel la temon de la UK "Interkompreniĝo, paco, evoluo".

Internacia Kongresa Universitato: La 39a sesio de IKU okazos

kadre de la 71a UK. La rektoro de IKU estos prof. Ye Junjian, elstara verkisto kaj i.a. komitatano de la Ĉina Federació de Literatura kaj Arta Rondoj. En la Esperanto-komunumo li estas konata kiel la originala verkisto Cicio Mar kaj pro la ĵus aperinta traduko (fare de W. Auld) de lia romano "Montara Vilaĝo".

Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj estas invitataj proponi prelegon antaŭ la 20a de januaro 1986 al la Komisiono pri IKU ĉe ties sekretario prof. Bruce Sherwood, Dept. of Physics, Carnegie-Mellon University, Pittsburgh PA 15213, Usono. Al tiu adreso oni sendu fotoportreton kaj kvar kopiojn de titolo, resumo, bibliografio kaj biografieto. Prelegantoj ricevos danksumon sed ne vojaĝkostojn.

Filatelaĵoj: La pekina UK verŝajne pliriĉigos Esperanto-temajn filatelaĵojn, ĉar okaze de ĝi la Ĉina Poŝto intencas emisii specialajn poŝtmarko(j)n kaj stampo(j)n. Tamen, definitivaj decidoj ĉi-rilate ankoraŭ ne estas fari-taj.

Kotizoj: La tarifo dum la unua regula kotizperiodo (valida ĝis la 31-a de decembro) estas la jena (ĉiuj prezoj en nederlandaj guldenoj):

Kat. 1: Ne membro de UEA	187,50
Kat. 2: Individua membro de UEA (baza kongreskotizo)	150,00
Kat. 3: Kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA	112, 50
Kat. 4: Kunulo/junulo/handikapulo, kiu estas ind. membro de UEA	75,00

La karavana kotizo por grupaliĝoj de 25 aŭ pli da personoj estas 90% de la baza kotizo. Atentu, ke ĉiuj prezoj plialtiĝos post la jarfino.

Perantoj: Diference de la koncerna informo en la Unua Bulteno la peranto por Aŭstralio estas s-ino Sylvia M. Burkitt, 32 George Mobbs Dr., 2154 Castle Hill, N.S.W. kaj por Kanado s-ino Merle Haltrecht-Matte, 122 Seaton Street, M5A 2T3 Toronto.

Interesiĝo en la Tria Mondo: La kongresa administracio ricevis multajn helpopetojn de junaj triamondanoj, kiuj volas partopreni la kongreson. Por povi eĉ nur io-

mete respondi al tiuj petoj kaj sekve pli tutmondigi la kongreson, UEA kalkulas pri solidareco de la esperantistoj en pli riĉaj landoj kaj forte alvokas pri donacoj al la Adopta Kaso de la UK.

Loĝado: LKK jam delonge rezervis grandan nombron da ĉambroj en pluraj hoteloj en Pekino, unuavice en tiuj, kiuj situas proksime al la kongresejo. Laŭ la nuna stato de la negocoj, ne eblas en Ĉinio apartigi la loĝadon disde manĝoj, urba transporto kaj enurbaj ekskursoj. Kalkulate en tiu maniero, bona hotelo en Pekino kostas ĉ. 160 guldenojn tage (en dulita ĉambro, kun du manĝoj, transporto kaj ekskursoj). La samo en luksa hotelo kostas inter 240 kaj 270 guldenoj. Tamen, LKK jam de pluraj monatoj provas certigi kelkcenton da litoj en studentaj domoj aŭ en komuna loĝejo, sed tia loĝigo de eksterlandanoj ĝis nun ne estis praktikata en Ĉinio kaj la koncernaj negocoj malrapide progresas, kvankam "ekzistas lumo", kiel oni lastatempe komunikis el Pekino. Meze de novembro en Pekino okazos definitivigo de la kontraktoj pri la loĝado, ekskursoj kaj ĉiuj aliaj servoj, pri kiuj la mendilo kutime aperas kun la Dua Bulteno. La plano estas, ke la Dua Bulteno aperu kiel eble plej frue en 1986 (tre verŝajne jam en januaro). Tiel LKK kiel la CO de UEA faras sian maksimuman eblon por atingi malpli altajn restadkostojn dum la 71a UK. Espereble, en la venonta komuniko ni jam povos diri al vi pli bonajn novaĵojn ĉi-rilate.

Vojaĝoj: Kvankam ni en la junia numero de "Esperanto" promesis tre baldaŭ elpaŝi kun la vojaĝplanoj de UEA por la 71-a UK, tio bedaŭrinde ankoraŭ ne estas farebla. Ni ja okupiĝas pri la organizo de tiuj grupvojaĝoj, sed ilia definitivigo povos okazi nur meze de novembro dum vizito de UEA-representanto al Pekino.

Kiel ni antaŭe anoncis, la plej malmultekostaj flugoj kostos iom pli ol 2 000 guldenojn, sed se oni volas ekskursi ankaŭ tra Ĉinio kaj resti tie plia(j)n semajno(j)n, necesas kalkuli pri kelkaj pliaj miloj da guldenoj. Intertempe, pluraj privataj esperantistoj anoncas siajn karavanojn al Pekino, profitante tiel la mankon de detaloj pri la UEA-karavanoj. Oni kelkfoje asertas, ke estas ia limigo de la nombro de partoprenantoj en la Kongreso kaj grupaj vojaĝoj, sed tio laŭ nia scio estas senbaza informo. Aliĝo al tiu aŭ alia grupa vojaĝo certe estas privata prefero de ĉiu unuopa kongresano. Tamen, laŭ nia scio ne necesas rapidi pri la elekto de la vojaĝo, kvankam ja necesas ŝpari por ĝi. Tiurilate la kongresanoj povas, sen ajnaj kostoj, deponi monon en sia UEA-konto, eĉ se poste montriĝos necese ĝiri tiun monon de UEA al iu el la privataj vojaĝ-organizantoj.

Statistiko: Meze de oktobro estis enskribitaj 1 018 kongresanoj el 49 landoj.



MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Hans Andersen en Ĉinio

Hans Andersen estas unu el la okcidentaj aŭtoroj, kiuj ricevas favoran akcepton en Ĉinio. Liaj fabeloj, kiuj en la dana lingvo nomiĝas "eventyr", aperadas en ĉinlingvaj eldonoj en diversaj formoj, kiel plena kolekto de fabeloj de Hans Andersen, elektitaj fabeloj de Hans Andersen, eldonoj por plenaĝaj legantoj, eldonoj por geknaboj ktp. La totala nombro de ekzempleroj de diversaj eldonoj atingis pli ol du milionojn. Plenkreskuloj kaj mal-

junaj homoj, samkiel geknaboj, ĉiuj ŝatas legi la verkáojn de la dana verkisto. Se ni konsideras, ke la fabeloj estis verkitaj antaŭ pli ol unu jarcento, la fakto, ke la legantoj de nuntempa socialisma Ĉinio montras tian entuziasmon por la fabeloj, estas fenomeno interesa.


Hans Andersen estis enkondukita en Ĉinion en la dudekaj jaroj de la nuna jarcento. Tiam estis la tempo, en kiu komenciĝis movado de tiel

La aŭtoro (staranta) faras prelegon sub la titolo "Hans Andersen en Ĉinio".



nomata nova literaturo, kiu ankaŭ kvalifikiĝis kiel “revolucio de literaturo”. Ĝi estis efektivigita de grandaj socia, politika kaj ideologia ŝanĝoj de tiu tempo. Tiam la lando estis ekonomie mizera, politike kaosa, en stato duonkolonia kaj duonfeŭdisma. Interne okazadis militoj inter diversaj koterioj de militestroj, kiuj, kunlaborante kun grandaj bienuloj kaj agentoj de fremdaj kapitaloj, regis kaj ekspluatis la popolon en mezepoka maniero. Ekstere internaciaj imperiistoj intervenis de tempo al tempo en la politikon de la lando, subtenante kaj utiligante la enlandajn militestrojn kaj politikistojn por militi intereksterme por siaj egoistaj celoj. Ĵetita en inferan kondiĉon, la popolamaso urĝe postulis reformojn kaj eĉ revolucion. Konsekvence, je la 4-a de majo 1919, la progresema parto de la popolo, la intelektuloj, reprezentataj de studentoj kaj profesoroj de la Pekina Universitato kaj aliaj institutoj de altaj scioj, manifestaciis kontraŭ la registaro, precipe kontraŭ la humiligita diplomatio, en Pekino, la ĉefurbo de la lando. Tiam la Unua Mondmilito jam finiĝis kun kapitulaco de Germanio. La diplomataj reprezentantoj de internaciaj potencaj landoj estis aranĝantaj novan mondordon en Versajlo. Antaŭ la mondmilito Germanio perforte akiris teritoriojn, kiel ekz. la Ŝandong-a Duoninsulo, kaj maljustajn privilegiojn el Ĉinio. Dum la milito Ĉinio flankiĝis ĉe la Entento kaj estis la venkinto, almenaŭ teorie. Kompreneble la teritorioj kaj privilegioj uzurpitaj de Germanio devis esti returnitaj al la propra origina posedanto. Anstataŭe, la farantoj de la pacotraktato ĉe Versajlo transdonis ilin al Japanio. La novaĵo el la pacokonferenco ŝokis la tutan ĉinan popolon, kiu konsideris la aferon kiel gravan humiligon kaj ofendon al ĝia nacia digno. La movado de la 4-a de majo ĝuste esprimis la popolan senton de la lando. Ĝi tuj disvastiĝis tra la lando kiel politika movado kontraŭ la korupta, malkapabla registaro interne kaj la maljustaj agoj kaj perfido flanke de potencaj landoj ekstere. Sur la kampo de kulturo ĝi heroldis nacian renesancon. La demando, kiun ĝi proklamis, estis moderniĝo de la lando, precipe de la politika kaj ekonomia sistemoj. Ĝia slogano estis: “demokratio” kaj “scienco” por la lando.

En literaturo ĝi sin esprimis kiel “literatura revolucio”. Per revolucio ĝi signifis, ke literaturo devis esti liberigita de la kutima praktiko de la tradiciaj intelektuloj, por kiuj literaturo estas rimedo por esprimi personan, privatan emocivon, kaj ĝi signifis ankaŭ, ke literaturo devis sin turni



La libro “Fabeloj” de Andersen ĉinigitaj de Chun-Chan Yeh

al la vivo de la popolo, al la suferoj kaj mizeroj de la popolamaso, al la urĝaj problemoj, kiujn la ŝtato alfrontis, por efektiviĝi progreson de la socio. La primara ŝanĝo okazinta en la nova literaturo sin montris en tiu de lingvo, stilo kaj formo: La ĉiutaga parolo de la popolo anstataŭis la klasikan, por ordinaraj homoj nekompreneblan lingvon de la tradiciaj intelektuloj, kaj novaj formoj de romano, rakonto, poezio kaj teatraĵo estis elprenitaj el moderna eŭropa literaturo kiel modeloj. Kaj sociaj problemoj fariĝis ĉeftemoj de la enhavo de nova literaturo. Literaturo por infanoj kaj geknaĵoj kreskis ankaŭ en la sama cirkonstanco. Efektive la ĉina infanliteraturo mem havis longan historion, sed ĝi ekzistadis nur en buŝtradicio daŭrigita de avinoj kaj vartistinoj ĉe la luliloj, neniam en la formo de skriblingvo por legado. Ne troviĝis en Ĉinio Charles Perrault aŭ Grimm fratoj, sekve ne estis skribita la buŝliteraturo por infanoj. Tian staton kaŭzis la obstina tradicio de konfuceanismo, kiu postulis, ke infanoj, ekde kiam ili komencas lerni legadon, devas eviti absolute rakontojn pri feinoj, sorĉistinoj kaj fantaziaj aventuroj. Legajoj tiaspecaj estis rigardataj kiel venenemaj al

la menso de infanoj kaj estis severe malpermesitaj. Tia rigora regulo celis kulturi la junan generacion kiel lojalajn defendantojn de la feŭdisma etiko kaj sociordo. Nature neniu intelektulo aŭdacis meti en skribado la buŝrakontojn de avinoj kaj vartistinoj, kiuj entenis supernaturajn elementojn.

Nur post la komenciĝo de la literatura revolucio infanliteraturo en la senco, kian ni nun komprenas de la termino, sin starigis kiel speco de literaturo en la kadro de moderna ĉina literaturo. Kaj troviĝis verkistoj por tia literaturo. Samkiel literaturo por plenaĝuloj, la nova infanliteraturo prenis fabelojn de okcidentaj landoj kiel modelojn en sia kreado de nova stilo, formo kaj enhavo. De tiam la verkoj de okcidentaj fabelistoj estis tradukitaj en la ĉinan lingvon. Kompreneble Hans Andersen unue ricevis atenton. Liaj "eventyr" fariĝis interesaj legaĵoj por ĉinaj geknaboj samkiel modeloj por ĉinaj fabelistoj en ilia verkado de nova infanliteraturo. Sed la traduko de la "eventyr" estis ĉefe farita pere de la angla, franca aŭ japana lingvo. Multe perdiĝis kompreneble la originala stilo kaj karakterizo kaj beletristikaĵo. Tial, kvankam Hans Andersen fariĝis bone konata al ĉinaj legantoj, tamen la disvastiĝo de liaj "eventyr" estis limigita. Al la stato atribuis kompreneble ankaŭ la sociaj kondiĉoj de tiu epoko.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 la sociaj kondiĉoj pli kaj pli boniĝis. Edukado estis popularigita kaj klereco de la tuta popolo kreskis rapide kaj la problemo de libroj pli grandiĝis. Ekde la jaro 1953 aperadis nova traduko de Hans Andersen. La unua libro publikigita estis malgranda volumo "Bildlibroj sen bildoj" tradukita rekte el la dana lingvo. Kvankam ĝi ne sukcesis vekti grandan intereson ĉe la junaj legantoj, tamen ĝi altiris grandan atenton de homoj el literatura rondo. En tiu ĉi malgranda volumo ĉinaj literaturistoj trovis, ke la aŭtoro estis ne nur fama rakontisto de fabeloj por infanoj, sed ankaŭ granda poeto. Oni trovis en la rakontetoj en la volumo abundecon de fantazio, hipersentemeco, naiva tamen profunda trarigardo de homa vivo kolorita de poezio. Vere, la nova traduko en la ĉina lingvo estis farita ĝuste laŭ tia kompreno kaj vidpunkto, ĉu en stilo kaj lingvo, ĉu en reprezentado de imagoj. Alivorte la tradukanto traktis la "eventyr" de Hans Andersen kiel poezion. Kaj kiel tia la fabeloj elvokis en la imago de ĉinaj legantoj vivan poezian bildon kun granda artistika magio. Kaj de post tiam la plena kolekto de fabe-

loj de Hans Andersen eldoniĝis volumon post volumo.

La fabeloj de lia frua epoko, t.e. tiuj verkitaj inter 1835 kaj 1845, kiel "Fajrilo", "Reĝidino sur pizo", "La virineto de maro", "Elinjo-fingreto", "Malgranda Niko kaj granda Niko", "Floroj de malgranda Ida", "Sovaĝaj cignoj", "La malbela anasido", "Neĝa Reĝino", "La najtingalo" kaj "La novaj vestoj de la Reĝo", tuj ensorĉis la junajn legantojn de Ĉinio. Ili trovis en la fabeloj novan mondon plenan de fantazio, poezio, varmece kaj homeco. Iliaj naivaj senartifikaj koroj batis kun la sama ritmo kiel tiuj de la geherooj en la fabeloj. Ili partoprenis ĝojon kaj malĝojon de tiuj personoj, jen verŝante simpation, jen esprimante bedaŭron, jen sentante miron por ili. Ili sin integriĝis en la emocio kaj vivo de la roluloj en la fabeloj. Tamen ili ne perdiĝis en la legado. Ili rezervis sian memjuĝon kaj konservis sian propran sintenon pri la konduto, la bono kaj la malbono de la individuoj en la fabeloj. Alivorte, kiam ili gustumis la plezuron devenintan de la rakontoj, ili samtempe lernis de la kondutoj de la personoj en la rakontoj pri la vivo.

Ke la verkistoj de nova ĉina infanliteraturo prenas Hans Andersen kiel modelindan aŭtoron, tio ankaŭ baziĝas sur tiaj trajtoj enkorpiĝitaj en la verkoj de la dana fabelisto. Kritikistoj ĉinaj alte taksas la fabelojn ankaŭ pro tio, rigardante ilin kiel valorplenajn ĝindajn kaj samtempe instruajn legaĵojn por hodiaŭaj gejunuloj en Ĉinio. La edukado de gejunuloj de la nuntempa Ĉinio celas kulturi ilin en socialistajn civitanojn. Oni trovas, ke la enhavoj de la fabeloj neniel kontraŭas tiun celon, sed suplementas ĝin. Tial dum la mallonga periodo de kvar aŭ kvin jaroj la fabeloj de Hans Andersen cirkuladis multope en ĉina libromerkato kaj aperadas en diversaj apartaj volumoj. En 1958 ili ricevis formon de plena kolekto, la unua plena fabelaro de la mondfama fabelisto en la ĉina lingvo, entenanta entute 168 rakontojn. Tuj poste la Instituto de Fremdaj Literaturoj de la Akademio de Sociaj Sciencoj selektis el ĝi reprezentantajn rakontojn kaj aperigis "La selektitajn verkojn de Hans Andersen". Ĝi viciĝis en "La serio de famaj verkoj de la monda literaturo". Aliaj eldonoj por legantoj de diversaj aĝgrupoj plue aperis en diversaj regionoj de la lando. Multaj rakontoj estis ankaŭ konvertitaj en bildstriaĵlibretoj por la ĝenerala publiko, kies eldonkvanto estas nekalkulebla.

(Daŭrigota)

LA UNUA ĈINA KONGRESO DE ESPERANTO RAPORTATA

En la 29-a de aŭgusto 1985 fermiĝis la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto, kiu daŭris 7 tagojn en Kunming. En la unua kaj dua tagdekoj de septembro la kongresanoj revenis hejmen. Multaj el ili senprokraste raportis la kongreson al sialokaj esperantistoj. En la Kultura Palaco de Laboruloj en Ĉengdu, Siĉŭan-provinco, okazis kunveno, en kiu raportis vicprofesoro Ning Souĵen, ĝenerala sekretario de la Siĉŭan-a Esperanto-Asocio, kaj parolis ankaŭ profesoro Liŭ Hongkang, prezidanto de la asocio. Okazis en Ningbo de Ĝeĝjang-provinco simila kunveno, kiu daŭris du horojn sub la prezidado de ĉefinĝeniero Baŭ Suĝjun, konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

LA ĈINA KORESPONDA ESPERANTO-INSTITUTO AKCEPTIS NOVAJN LERNANTOJN

La instituto fondiĝis en marto 1985. En la pasintaj monatoj rapide disvolviĝis ĝia laboro. Ĝis la komenco de oktobro ĝi havis siajn filiojn en dek provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj instruajn staciojn en pli ol 20 grandaj kaj mezgrandaj urboj. La instituto redaktas la dumonatan gazeton "Lernilo de Esperanto", kiu gvidas la lernantojn per dulingvaj legaĵoj, solvitaj malfacilaj demandoj kaj sperto en lernado. Ĝis la jarfino la instituto eldonis kvin numerojn. Por disvastigi Esperanton, ĝi akceptis novajn lernantojn, kies studo daŭros unu jaron.



La Siĉŭan-a Esperanto-Asocio raportas la Unuan Ĉinan Kongreson de Esperanto.

JUNAJ ESPERANTISTOJ DONACIS LIBROJN AL INSTRUISTOJ

11 junuloj de la prepara grupo de Esperanto-Asocio de Dabjeŝan, Sinĝang-gubernio, Henan-provinco, aĉetis pli ol 40 Esperantajn librojn kaj 20 Esperantajn poŝtkartojn por instruistoj de 9 mezlernejoj de la gubernio. Ili aldonis Esperantajn propagandilojn kaj sur la titola paĝo de la libroj skribis "Al popolaj instruistoj, kiuj sin dediĉos al la Esperanta afero". Respondeculoj de la presejo de la gubernio kaj du laborantoj de la nomita prepara grupo partoprenis en la librodonado. La gubernia radiostacio informis pri la aktivado, kiu gajnis simpatian de la socio por Esperanto kaj altiris nemalmultajn instruistojn al Esperanto.

RENKONTIĜO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ

De la 5-a ĝis la 14-a de julio 1985 okazis en la pola urbo Koszalin tre interesa renkontiĝo de germanaj kaj polaj junaj esperantistoj. Laŭ la invito de E-klubo "Progreso" de la kulturdomo de la junularo en Koszalin partoprenis 14 germanaj amikoj el la

distrikto Karl-Marks-Stadt kaj subdistrikto Prenzlan en GDR. Ili faris ekskurson en bela regiono de Koszalin, okazigis interesan konversacian kurson kaj partoprenis en diversaj sportaj, kulturaj kaj sciencaj konkursoj.

Krome, antaŭ la UK en Aŭsburgo okazis ankaŭ tre interesa renkontiĝo de germanaj, finnlantaj kaj francaj esperantistoj en la distrikto Karl-Marks-Stadt en GDR. Ili diskutis pri la tasko de Esperanto en porpaca laboro.

DU JUNAJ ESPERANTISTOJ RONDIRAS EN LA MONDO

Junaj francaj esperantistoj Bruno Robineau (31-jara) kaj Maryvonne Réthoré (27-jara) faras longan vojaĝon tra la mondo, dum kvar jaroj ekde aŭgusto 1985, por studi agrikulturon en diversaj ekonomiaj sistemoj. Tiucele ili deziras starigi amikajn rilatojn kun homoj de ĉiuj landoj, liaj tiuj de Hungario, Usono, Indio, Brazilo, Tanzanio, Ĉinio, Japanio, Korea Respubliko, Kubo kaj Tajlando.

Ili ambaŭ estas membroj de UEA kaj esperas la kunlaboron kaj helpon de la esperantistoj pri la portempaj laboreblecoj en agrikulturaj instalaĵoj.



Ekspozicio de ĉinaj eldonaĵoj okazigita de ges-roj L. Z. Enizan en junio 1985, en la Sporta Festo en Rueil-Malmaison

INTERNACIA FOIRO DE ESPERANTO-KULTURO

Tiu aranĝo okazos de la 9-a ĝis la 15-a de majo 1986 en Zielona Gora-Raculka, Pollando. La ĉi-jara IFEK estos antaŭaranĝo de IJK de 1987 en Krakovo. La volontuloj, kiuj intencas prezenti programeron en IJK de 1987, venu al IFEK. Vi ankaŭ povos post IFEK veturi al Upsala en Svedio, kie de la 17-a ĝis la 19-a de majo okazos la Kultura Esperanto-Festivalo.

NOVAJ E-ORGANIZAJOJ EN VENEZUELO

La Zulia Esperanto-Asocio fondiĝis antaŭ nelonge. Ĝi konsistas el ĉiuj E-klubo en la okcidenta regiono de Venezuelo. En julio kaj aŭgusto 1985, s-ro David G. Valecillos, prezidanto de la Zulia Esperanto-Asocio, gvidis Esperanto-kurson en la bela urbeto SAN CARLOS DEL ZULIA. Post sia finlernado la kursanoj decidis fondi Esperanto-klubon, la unuan en tiu urbeto.

NOVA KONGRESO DE UFE

La venonta kongreso de la Unuiĝo Franca por Esperanto okazos en Gerardmer (Vogezoj) de la

16-a ĝis la 21-a de majo 1986, pri la temo: Esperanto kiel komunikilo cele al komuna paco. La Orienta Federacio organizos tiun kongreson.



Membroj de la Esp-Klubo en San Carlos del Zulia, Venezuelo

Korpokonstrua turniro de Ĉinio

Iun someran vesperon de 1985, en la teatro de la Pekina Ekspoziciejo kvin junuloj en naĝvesto sursceniĝis en muziko, iliaj fortikaj brunaj korpoj radiis de energia juneco. Miloj da spektantoj tuj varme aplaŭdis.

Laŭ la ordono de juĝisto, ili faris serion da pozoj, laŭvice montrante siajn brakojn, bruston, dorson, abdomenon kaj gambojn. La muskoloj elstariĝintaj vidigis la forton, la krudaj kaj fortaj konturoj de muskoloj donis al la spektantoj estetikan ĝuon. Pozante, ili estis kvazaŭ belaj skulptaĵoj, en kiuj kunfandiĝis beleco kaj forto.

Jen estis la spektaklo de la Tria Ĉina Korpokonstrua Turniro de "Atleta Pokalo". La turniro estis iniciatita de la ĉinaj korpokonstruaj sportistoj kaj amatoroj por popularigi la sporton. Ĝi ricevis subtenon de la koncernaj registaraj departementoj kaj aprobon de la socio. La unua turniro okazis en Ŝanhajo en 1983, la dua

en Kantono en 1984. La tria superis la antaŭajn du en skalo, ĝin partoprenis 23 teamoj kun 99 sportistoj.

La korpokonstrua sporto ne estas tiel populara kiel tabloteniso en Ĉinio, ne multaj ĉinoj sin ekzercas per tiu sporto. Tamen ĝi kiel oficiala sporto ne unuafoje aperis en Ĉinio. Ĝia unuafoja apero en Ĉinio estis en la tridekaj jaroj de tiu ĉi jarcento.

Estis konate, ke la antikva Grekio iniciatis homkorpan belecon, tiam oni kreis multajn eminentajn artaĵojn por montri homkorpan belecon. Sed la ĉina tradicia kulturo ne admiris la naturan belecon de la homa korpo, ĝi postulis, ke oni plene kovru la korpon per vestoj. En la komenco de la nuna jarcento, post renversigo de la ĉina feŭda dinastio, falis ankaŭ la feŭdisma kulturo. En la tridekaj jaroj, la internacia korpokonstrua sporto atingis novan disvolviĝon, du junaj ĉinoj kuraĝe enkondukis la sporton en

Ĉinion. Post 50 jaroj la junuloj jam maljunuliĝis. Unu el ili estas 69-jara Zeng Ŭejĉji, direktoro de la organiza komisiono de la turniro "Atleta Pokalo" kaj ĝenerala juĝisto de tiu ĉi konkurso. La alia iniciatinto estas pli-ol-70-jara Ĝaŭ Ĝugŭang, prezidanto de la Ĉina Halterleva Asocio.

De 1940 s-roj Ĝaŭ Ĝugŭang kaj Zeng Ŭejĉji komencis vastigi korpokonstruan sporton kaj fondis la Ŝanhajan Korpokonstruan Kolegion, unikan en tiu tempo. En 1944, dank' al ilia klopodo okazis en Ŝanhajo la vira korpokonstrua konkurso, unuafoja en la historio de Ĉinio, kies ĉampionecon kaj subĉampionecon gajnis iliaj lernantoj.

La ĉina vira korpokonstrua turniro de "Atleta Pokalo" komencita en 1983 aplikis regulojn kaj procedon fundamente samajn kiel tiuj de la nunaj internaciaj korpokonstruaj konkursoj. Ĝi havas kategoriojn de 65kg, 70kg, 80kg, kaj super 80kg. La turniro

**MENDU
JARKOLEK-
TOJN
DE EPC!**

La redakcio de EPC vendos malgrandan kvanton da EPC-jarkolektoj de 1983 kaj 1984, ĉiu kun prezo de 12.5 usonaj dolaroj. La legantoj kaj Esp-organizoj povas mendi ilin ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de la Interna-

cia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHU-DIAN), P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

Bv. atenti la venontan anoncon de la redakcio de EPC pri mendo de la jarkolekto de 1985.

amplaksas difinitajn movojn (identajn al tiuj de la internacia konkurso) kaj memelektitajn movojn. Sportistoj povas partopreni finalon nur post kiam ili sukcese trapasis 10 sinsekvajn konkursojn antaŭ la rigoraj okuloj de juĝistoj.

La tria turniro "Atleta Pokalo" daŭris tri tagojn. La 99 sportistoj partoprenis la konkurson. Fine kvar el ili gajnis la ĉampionecon de la kvar kategorioj respektive.


La 25-jara Li Ŝinŭen gajnis la ĉampionecon de 65-kilogramo kategorio. Li venis de la suda landlima provinco Junnan kaj estas termo-trakta laboristo de unu fabriko en la provinca ĉefurbo Kunming. Je la aĝo de 19 jaroj li trovis sin tro dika kaj volis sin maldikigi. Sekve li eniris la urban korpokonstruan kolezion. Post kelke da tempo li jam ne kontentiĝis pri la antaŭa celo kaj absorbiĝis en la sporto. En ĉifoja turniro, li konkeris la juĝistojn kaj spektantojn per sia muskolplena korpo kaj movoj harmoniaj kun la muziko.

La 27-jara Li Ĝongbaŭ, ĉampiono de 70-kilogramo kategorio, venis de la pitoreska urbo Suĝoŭ de Ĝjangsu-provinco. Li, silentema, okupiĝis pri halterlevado dek jarojn kaj pri korpokonstrua sporto 3 jarojn. Li estas laboristo de fabriko de biciklaj pecoj, la fabrikaj gvidantoj aprobis lian postlaboran aktivadon. Lia fianĉino memvole prokrastis la geedziĝon por ke li plenenergie faru antaŭturniran ekzercadon. Lia 66-jara patro amas korpoekzercadon. Li ellitiĝas kaj faras kuradon ĉiumatene, je la 4-a horo. Lia tria pliĝa frato estas profesia halterleva trejnisto de Suĝoŭ. Li Ĝongbaŭ opiniis, ke li suriris la sportan vojon, influite plejparte de la patro kaj pliĝa frato.

La plej jura el la kvar ĉampionoj estas 22-jara pekina sportisto He Juŝan, kaj lia historio de tiu sporto estas ankaŭ la plej mallonga. Sed lia diligenteo en la trejnado estas neniam malpli granda ol tiu de la aliaj. Li laboras en Tongŝjan-gubernio ĉe la orienta antaŭurbo de Pekino. Por ricevi la trejnadon en postlabora sporta lernejo en la urbo, li devas veturi 3 horojn. Sed li neniam rompis sian trejnadon pro ventego aŭ pluvego. En pli ol unu jaro post la komenco de korpokonstrua trejnado, li difinis al si tagordon simplan kaj klaran: Laboro — dormo. Li faris en si la decidon: Li ne ĉesigos la klopodon antaŭ efektiviĝo de la celo. Ĉifoje, kiam li staris sur la podio, alte tenante la pokalon, kaj vidis siajn parencojn aparte venintajn por rigardi la konkurson, li ne povis deteni sin de larmoj.

La ĉampiono de super-80-kilogramo kategorio estas 29-jara Ŝang Gang, baritono de la Kantona Muzika kaj Ĉjuji-a Trupo. En 1978 li rimarkis sian dikan korpon dikiĝanta rapide. Por bridi la tro fruan dikiĝon, li konsultis la luktartan kaj korpokonstruan trejnejon. Vidante lin, la pli-ol-60-jara korpokonstrua trejnisto diris al li: "Vi trovos vian perspektivon en korpokonstrua sporto." La vortoj malfermis al Ŝang Gang novan vojon. De tiam korpokonstrua trejnado fariĝis la dua temo en lia vivo. Ŝvitado akompanis lin en 2 500 vesperoj. Li elspezis multe kaj akiris meritantan premion. En la turniro li gajnis ne nur la ĉampionecon de super-80-kilogramo kategorio kaj ankaŭ senkategorian ĉampionecon per siaj forta korpo kaj belaj pozoj plenaj de forto. Per tio li fariĝis stelo de la Tria Ĉina Korpokonstrua Turniro de "Atleta Pokalo".

La ĉina korpokonstrua sporto denove prosperis de 1978, unue en la urbegoj Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono. Nun ĝi disvolviĝas al mezgrandaj, malgrandaj urboj kaj gubernioj. La ŝatantoj de tiu sporto plejparte estas junuloj kaj knaboj, kiuj forte deziras fortikan korpon. Post 1978 sinsekve aperis diversaj trejnaj organizoj de korpokonstrua sporto en diversaj lokoj, kies klasanoj varias inter cent kaj 20-30 kursanoj. La sportistoj, kiuj partoprenis la turniron, venis el 21 provincoj de Ĉinio kaj estis elektitaj el miloj da korpokonstruaj sportistoj.



La turniron "Atleta Pokalo" partoprenis nun nur viroj. Ĝi estas tute nova kaj defia por ĉinaj virinoj. Ĉar tio signifas, ke ili devos fari intensan trejnadon kaj superi la tradiciajn konceptojn de la socio kaj sia psiko. En la lastaj jaroj, inspirite de la virinaj piedpilkado kaj ĵudo, iuj kuraĝaj junulinoj de Ĉinio enpaŝis en tiun novan kampon. Pekinaj junulinoj unue starigis virinan korpokonstruan kurson. En la turniro junulinoj de la virinaj korpokonstruaj kursoj de Dongĉeng-distrikto kaj la redakcio

"Ĉina Virino" faris prezentadon, tio montris ilian kuraĝon kaj la fruktojn en la trejnado.

La ĉina korpokonstrua sporto havas kontakton kun tiu internacia kaj fariĝas esperiga forto en la mondo. En 1984 du ĉinaj observantoj ĉeestis al la 38-a Internacia Amatora Korpokonstrua Ĉampioneca Konkurso. Somere de 1985 Ben. Weider, prezidanto de la Internacia Federacio de Korpokonstruo, speciale veturis al Pekino por rigardi la 3-an Ĉinan Korpokonstruan Turniron de "Atleta Pokalo". En la premia ce-

remonio li diris: "Antaŭ 27 jaroj mi vizitis Ĉinion. La ĉina korpokonstrua sporto disvolviĝis tre rapide, ke iuj sportistoj jam atingis la mondan avangardan nivelon." Sinjoro Ben. Weider en la nomo de la Internacia Federacio de Korpokonstruo, donis arĝentan medalon kun plej alta honoro al la fama ĉina halterlevisto Ĉen Ĝingkaj, kiu plurfoje rompis la mondan rekordon de halterlevo, al la pioniroj de la ĉina korpokonstrua sporto Ĝaŭ Ĝugŭang kaj Zeng Ŭejĉji meritajn atestojn por laŭdi ilian kontribuon al la korpokonstrua sporto.

La Tria Ĉina Korpokonstrua Turniro de "Atleta Pokalo"





La konkursejo


Ĉinaj sportistoj en la Kvina Mondpokala Konkurso de Akrobataĵa Gimnastiko

Fotoj de SEN ĈEN

La ĉina sportistoj Ŭang Pej, Gaŭ Gje, Ŭang Lijoŭ kaj Goŭ Ĉuanbjaŭ gajnis la ĉampionecon de la vira kvaropa kunmetita ludo.

Foto de ĈENG JUSAN

La ĉinaj sportistoj Sju Hong kaj Hu Bingĉen gajnis la oran medalon de la unua serio de prezentado por la vira duopa ludo.





La sovetiaj sportistoj geedzoj M. Svetlana kaj M. Evgeni gajnis la oran medalon de la miksa ludo.

La ĉinaj sportistinoj Jang Ping, Li Ĝjun kaj Lu Hajjan gajnis la oran medalon de la unua serio de prezentado por la virina triopa ludo.



La sovetiaj sportistinoj Inessa, Natali kaj Svetlana gajnis la oran medalon de la unua serio de prezentado por la virina triopa ludo.

La bulgaraj sportistinoj S. Kostova kaj I. Bakalova gajnis la oran medalon de la unua serio de prezentado por la virina duopa ludo.






Diverslandaj sportistoj gratulas unu alian.

En la mezo de la lasta septembro okazis en Pekino la Kvina Mondpokala Konkurso de Akrobataĵa Gimnastiko. Post la 3-taga streĉa konkurso la sovetia teamo gajnis 12 el la 25 oraj medaloj de la sep branĉoj. La ĉina teamo 9 kaj la bulgara teamo 4.

Ĉinio aliĝis al la Internacia Federacio de Akrobataĵa Gimnastiko en 1979. En la sekva jaro ĝi unuafoje partoprenis en la monda konkurso kaj gajnis nenun medalon.

La britaj sportistinoj en konkurso




La FR-germanaj sportistinoj W. Claudia, W. Tanja kaj K. Karin en konkurso

La bulgaraj sportistoj gajnis la ĉampioncon de la dua serio de prezentado por la vira kvaropa ludo.



Daljan bonvenigas vin

de ĜANG ĜUANGŜING



La placo Sun Jatsen

Daljan, situanta ĉe la suda ekstremo de Ljaŭdong-duoninsulo en nordorienta Ĉinio, estas duoninsula urbo. Rigardate de aviadilo malsupren, la marbordo pli ol 890 kilometrojn longa kvazaŭ arĝenta rubando ĉirkaŭvolvas la verdan duoninsulon kaj la verdaj golfoj kvazaŭ gemoj inkrustiĝas sur la rubando. Pro tio, ĉiuj turistoj venintaj al Daljan senescepte rapidas al la maro por ĝui la marbordan pejzaĝon, kvietan kaj belan.

La suda marbordo de la urbo estas fama turisma loko. Se vi ŝatas ĝui la pejzaĝon surtere, tie servas al vi marborda turisma vojo serpentanta inter verdaj arboj kaj la smeralda maro. En varma somero unuflanke de la vojo imponas montĉenoj kun densaj arbaroj el pingloarboj kaj foliarboj kaj prosperas floroj ĉe la arbarrandoj kaj montpiedoj, aliflanke de ĝi blue brilas la senlima maro. Diversformaj kaj diversgrandaj rifoj kaj insuloj punktiĝas en la proksima maro. La pitoreskejoj laŭ la vojo diferencas unu de alia: Sur la plaĝo Tigro majestas ĉielskrapantaj cedroj, zigzagas kvietaj padoj kaj dense kuŝas groteskaj rifoj. La kaverno Tigro sur la plaĝo altiras

turistojn al "profunda tigra nesto", por ke ili tie aŭskultu muĝadon de la maro trans la muro. La ebena plaĝo de la Klaba Insulo kun blanka sablo kaj verda insuleto inkrustita nur 600 metrojn for de la bordo, kiuj kunfandiĝas kun la kolorriĉaj ombrelformaj budoj kaj verdteglaj vestoŝanĝejoj, formas harmonian tuton, kio ĉarmas turistojn. Tie restoracioj kaj vilaoj glazure brilas inter floroj kaj arboj kvazaŭ belaj palacoj en fea mondo. Ĉe la kruta marbordo de la Ŝtela Maro punktiĝas kioskoj, ĉie ĉarmas florbedoj, la arkforma marborda banejo 800 metrojn longa povas enteni dekmil naĝantojn. Ĉe la bordo funkcias restoracio en formo de plezurŝipo. Tie gustumi la lokajn marproduktaĵojn kaj ĝui la maran pejzaĝon estas aparte interese.

Kiu volas ĝui la pejzaĝon surmare, povas vojaĝi ŝipe. Rigardante malantaŭen de plezurŝipo ĉe la plaĝo Tigro, oni povas vidi altajn pinojn, verdajn cipresojn, krutaĵojn kaj groteskajn rokojn. Oni povas vidi ankaŭ la grandiozan "Komandan Terason", alte levigantan "Sud-ĉielan Pordon" kaj akvosorban rokon "Elefantrosto". Veturante per plezurŝi-

po, oni povas ĝui la "Tigrodentan Rifon", "Edzosopiran Rifon", "Homvizaĝan Rifon" kaj insuletojn. Tie ĉiu insulo estas mirinda pejzaĝo. Pri ĉiu rifo cirkulas legendo interesa kaj pensiga.

Estas pli bone viziti la Daljanan Naturan Muzeon post la mara vojaĝo. Tie estas eksponataj pli ol 2 700 specimenoj, kiaj tiuj de mineraloj, origino de la vivo, animaloj, plantaĵoj kaj maraj kreskaĵoj. Inter ili la specimenoj de la maraj kreskaĵoj estas aparte enhavoriĉaj. Tie turistoj povas refoje vidi la belegan pejzaĝon de la mara mondo kaj aŭdi multajn anekdotojn pri maraj kreskaĵoj.

Ankaŭ la urba pejzaĝo estas distingiĝa. Tie bonorde etendiĝas puraj stratoj ombrataj de arboj, kuŝas florbedoj, lokiĝas domoj apud monto en vicoj. La domoj konstruitaj en la lastaj jaroj estas helbluaj kaj helflavaj en harmonio kun la marborda pejzaĝo. Ili brakumas la postlasitajn romanikajn, gotikajn kaj barokajn ruĝvolbajn katedralojn kaj verdtegmentajn loĝdomojn, kiuj interkruĉiĝe staras tie kaj tie. Aparte okulfrapaj estas pli ol 50 promenejoj kaj placoj dislokitaj en stratoj, kiuj faris Daljan vere ĝardena urbo. Inter ili estas famaj la pla-



La marbanejo en la parko Stela Maro

memoraĵoj belaj kaj malmultekostaj, sed estas ankaŭ videbla la prilaborado de mirindaj kaj belaj metiartaĵoj el krudaj konkaj aŭ arda vitra likvaĵo.

Daljan estas famaj produktejoj de pomoj kaj fiŝejo de Ĉinio. Ĝia jara produktokvanto de pomoj konsistigas seponon de tiu de la tuta lando, kun pli ol cent specioj, inter kiuj la plej bonspacia estas Gūogūang. Krom pomoj, tie abundas aromaj sukoplenaj piroj, oraj persikoj kaj grandaj vinberoj, kiuj ankaŭ allogas turistojn. Dum la rikolta sezono de junio ĝis novembro ĉiujare, turistoj povas gustumi ilin en fruktogardenoj. Daljan, ĉe kunfluejo de frosta kaj varma fluoj, plej taŭgas por bredi fiŝojn kaj moluskojn. Mondfamaj salikokoj, haliotoj (*Haliotis gigantea*), holuturioj, pektenoj, eĥinodermoj k.a. estas tieaj specialaj produktaĵoj. Tiuj maraj valoraĵoj preparitaj de lertaj kuiristoj fariĝas pladoj belaspektaj, bongustaj, refreŝigaj kaj nutroriĉaj. Kaj multaj eksterlandaj turistoj mendis bankedon kun tiaj pladoj pere de la turisma servo antaŭ sia alveno al Daljan.

(Daŭrigo sur p. 45)

coj Sun Jatsen kaj Stalin, la lasta kun gazona areo de pli ol 40 mil kvadrataj metroj, kvazaŭ giganta verda tapiŝo inkrustita per buntaj rozbedoj, sterniĝas antaŭ la urbodomo. Ambaŭflanke de la placo sin trovas po unu bela parko, kiu allogas turistojn por fotado.

Multaj turistoj interesiĝas pri vizito de la haveno Daljan kaj metiartaĵaj fabrikoj. La elegantaj perlamotaj bildoj kaj vitro-artaĵoj de la Daljan-a Perlamota Fabriko kaj Daljan-a Vitraĵa Fabriko ĉiuj famas tra Ĉinio kaj estas vendataj en aliaj landoj. En tiuj fabrikoj estas aĉeteblaj ne nur turismaj

La nova turisma loko Malgranda Fuĝjaĝŭang





Bronzaĵo kun figuro feng en la frua periodo de Ĝou-dinastio

Feng, same kiel la legenda besto drako, (legu la artikolon "Legendo pri Drako" en nia gazeto, n-ro 12, 1985), ne ekzistas en la naturo. Ĝi estas birdo aparta en legendoj de Ĉinio. Antaŭe ni esperantigis *feng* preskaŭ ĉiam en fenikson, sed fakte ĝi diferencas de la birdo, kiu ĉiucentjare mortas en flamo kaj renaskiĝas el sia cindro. Ĝi nur iom similas al fenikso en la okcidentaj legendoj.

Jam en la prahistorio de Ĉinio cirkulis legendo pri *feng*, kiu, kiel totemo de klana tribo, estis rigardata kiel dia birdo. En la fruaj klanoj ĝi estis kokforma. Poste la tribo, kiu prenis *feng* kiel sian totemon, ensorbis en intertriba batalado kaj aneksado belajn partojn de la birdaj totemoj de aliaj

Stongravurita feng en Han-dinastio




Telero kun desegnaĵo de duobla feng de Ĉu-regno en la periodo de Militantaj Regnoj

triboj kaj plibeligis la sian, kies kapo similas al tiu de ora fazano, kies kresto al ĵuji, S-forma jada ornamaĵo en la antikva Ĉinio, kies beko al tiu de papago, flugiloj al tiuj de giganta vulturo, piedoj al tiuj de gruo, plumoj al tiuj de pavo kaj kies korpo estas bunta. Literaturistoj kaj artistoj de ĉiuj ĉinaj dinastioj donis al *feng* profundan signifon, ke ĝi portu pli da trajtoj de la ĉina nacio, ekz. ĵuji simbolas kontenton, papaga beko belan muzikon, pava vosto feliĉon, grujaj piedoj longvivecon kaj vulturaj flugiloj brilan perspektivon.

La antikvaj ĉinoj rigardis *feng* kiel birdreĝon, bonaŭguran kaj dian birdon. *Feng* estas priskribata en mitoj, folkloro kaj eĉ historiaj verkoj. En la okuloj de la ĉinoj ĝi estas birdreĝo bela kaj lerta en dancado kaj kantado. Ĝia apero signifas alvenon de paco, trankvilo, feliĉo kaj bona aŭguro.

En legendo *feng* estis virseksa. Ĝi kaj la inseksa legenda birdo *hŭang* estis birdoparo. Sed en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) iu bela amhistorio parigis *feng* kaj drakon kaj tiam *feng* fariĝis simbolo de virina sekso. Estas bela amrakonto pri tio: En la periodo Printempo kaj Aŭtuno (770 a.K. — 476 a.K.) Nongju, filino de Mugong, regnestro de



Ornamaĵo en formo de feng en la periodo de Militantaj Regnoj

Ĉin, enamiĝis al Ŝjaŭ Ŝi, junulo lerta en flutado. Mugong konstruigis imponan terason por ilia nupto. Tiutage Ŝjaŭ Ŝi flutis imite kanton de *feng* kaj senatende venigis drakon kaj *feng*. Ŝjaŭ Ŝi ekrajdis sur drako kaj Nongju sur *feng*, kaj ili kune leviĝis al la ĉielo. Tiel drako fariĝis simbolo de vira sekso, dum *feng* — simbolo de virina sekso. La legendo havas grandan influon sur la posteuloj. En Song-dinastio (960-1279 p.K.) ĝia imperiestro pretendis, ke li simbolas drakon, dum *feng* fariĝis simbolo de lia edzino.

Feng kaj drako kune eniris en la imperiestran palacon de Ĉinio. Ĉie en ĝi videblas figuro de *feng*, ĉu sur la domoj, ĉu sur veturiloj, vestoj, ornamaĵoj kaj aliaj objektoj. En la imperiestra palaco la edzino kaj kromedzinoj de la imperiestro havis *feng*-loĝejon. Iliaj veturiloj, vestoj kaj kapvestoj portis la nomon de *feng*.

La figuro de *feng* ne nur troviĝas en la imperiestra palaco, sed ankaŭ estas vaste uzata de la



Pentraĵo pri la birdo feng en Han-dinastio



Brokaĵo kun desegnaĵo de feng en Tang-dinastio




Kruĉo kun verŝilo en formo de kapo de feng en Ĵuan-dinastio

Popola desegnaĵo de feng

ordinara popolo. La laboruloj metis sian belan idealon sur la figuron de *feng*, kiu montriĝas sur brodaĵoj, vakstinkturitaj teksaĵoj, paper-tranĉaĵoj, kruc-stebitaj tukoj kaj aliaj popolaj metiartaĵoj. En Ĉinio la bela figuro de *feng* troveblas ankaŭ sur tradiciaj bronzaĵoj, metalaj metiartaĵoj, porcelanaĵoj, brikaj kaj ŝtonaj gravuraĵoj, plafonaj desegnaĵoj,

freskoj, lakitaj mebloj, silkaĵoj kaj vakstinkturitaj ŝtofoj kaj sur modernaj pakaĵoj, markoj, montrofenestraj ornamaĵoj, silkaĵoj kaj aliaj teksaĵoj, bambuaj plektaĵoj, lignaj gravuraĵoj, eburaj kaj jadaj skulptaĵoj, tapiŝoj kaj teatraj scenejoj. Dank' al sia bela figuro kaj originala ĉarmo, *feng* ĉiam pli plaĉas al la popoloj de diversaj landoj.



Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
			32	9365
			30.1	9965
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	30.4	9860
			26	11515
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
			43.1	6955
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
			19.4	15385

Reformado de alkala tero

Frusomere de 1985 en la norda parto de la gubernio Ĉjuĝoŭ, Hebej-provinco, ĉe la rivero Ĝanghe, ruliĝis oraj ondoj en la tritikaj kampoj, en la vilaĝoj ĉie vidiĝis novaj domoj ombrataj de verdaj arbaroj, la vilaĝanoj radiis de ĝojo. Regas vera prospero.

Vidinte tiun ĉi prosperan aspekton, oni ne povas imagi, ke antaŭ dek du jaroj ĉi tie estis senlima sterila lando, kun neniu verda plantaĵo vivsimbola, escepte de kelke da tufoj de alkalaj herboj balanciĝantaj en vento. La vidaĵo tute surprizis Ŝi Jŭanĉun, docenton de la fakultato de grunda agrokultura kemio de la Pekina Agrikultura Universitato. Kvankam li jam delonge informiĝis pri la tieaj katastrofoj de historiaj libroj, ke "pro alkalo la norda parto de Ĉjuĝoŭ kaj la ĉirkaŭaj lokoj fariĝis preskaŭ sterilaj. . ." kaj "en vilaĝo kun 500 loĝantoj mor-

tis pli ol 140 pro malsato kaj dudek familioj disiĝis nur en la jaro 1943". Sed ĉio ĉi ja okazis antaŭ la Liberiĝo. Estis tute ekster lia atendo, ke ĝis nun ankoraŭ ne finiĝas la katastrofo alportita de alkalo.

Jam en siaj knabaj jaroj Ŝi Jŭanĉun decidis dediĉi sin al reformado de grundo, kaj tiam li sentis honton kaj maltrankvilon pro tio, ke li faris nenion por reformi alkalan teron ĉi tie. Kelkajn tagojn poste, li kunvenis kun docentoj Lin Pej, Ŝin Dehuj, Maŭ Daĵu kaj Taŭ Jiŝoŭ. Estis ekster lia atendo, ke ili ĉiuj havis tute saman opinion kiel li, t.e. iri al Ĉjuĝoŭ. La nobla idealo sin dediĉi al la afero reformi alkalan teron donis al ili forton kaj kuraĝon.

Veninte al la gubernio Ĉjuĝoŭ, ili ĝentile rifuzis la bonvolajn zorgojn de la gubernia registaro kaj enloĝiĝis en Ĝangĝŭang, kiu plej

serioze suferis de alkalo. Ilia loĝejo estis simpla kabano. Tage ili esploris en la kampoj kaj vespere en la kabano konsultis referencarojn, laboris pri projektoj kaj faris eksperimentadon. En la pluva tago ili do laboris sub plasta membrano, por ke la polvoj kaj pluvakvo falintaj ne malhelpu ilian laboron. En la unuaj tagoj ili ne kutimis trinki amaran akvon kaj suferadis de lakso. Ili malgrasiĝis, sed pli vigliĝis.

Ke la instruistoj de la agrikultura universitato venis al Ĝangĝŭang, tio vekis grandan intereson ĉe la vilaĝanoj. Ili rigardis la instruistojn per dubaj kaj aspiraj rigardoj.

La instruistoj komprenis, ke konkeri trosekecon, superakvon kaj salalkalon estas malfacile. En fakaj verkoj pri salalkala tero troviĝas klasika rimedo: "Fosi kanaletojn por dreni akvon kaj per

Sterila alkala kampo



Kampano skrapas alkalon teron por sensaligi ĝin



akvo forlavi alkalon". Tamen ĝi estas efika nur en la seka regiono. Ĉi tie la salalkala tero apartenas al la zono de duonhumida musono. Reformi alkalon teron en tia regiono ankoraŭ estas nesolvita problemo en la mondo.

Por koni la leĝon de la movoj de subteraj akvo kaj alkalo ili trairis vilaĝojn kaj vizitis multajn familiojn. Nur en la unuaj tri jaroj ili akiris cent kelkdek mil donitaĵojn. Sin bazante sur la novaj vidpunktoj ili malkovris la miljaran enigmon de la tiea alkala tero. La alkaliĝo de la tersurfaco kaŭziĝis de la leviĝo de subtera alkalo. Trosekeco kaŭzas grandkvantan vaporigon de la subtera akvo kaj salalkalan kolektiĝon sur la grundsurfaco; superakvo altigas la nivelon de subtera salalkala akvo, kio pliseriozigas la teran alkaliĝon. Kaj tiel formiĝas katastrofoj de trosekeco, superakvo, alkalo kaj salo.

La kaŭzon ili fine trovis, sed kiun "recepton" oni devas preskribi por ĝi? Kvazaŭ doktoroj faras kuracistan konsiliĝon, ili kune esploris kaj ellaboris kuraĝan projekton, spite la teorion ke malprofunda subtera salakvo ne

povas esti utiligata: Multe bori putojn ĉ. 30 metrojn profundajn kaj fari sintezan reforman sistemon, prenante malprofundajn putojn kaj profundajn kanaletojn kiel ĝiajn ĉefajn rimedojn. Tiu sinteza reformo bone efikis. Kun la grandkvanta eltiriĝo de la malprofundtavola akvo, la subtera akvonivelo malleviĝis, kio reduktis la alkaliĝon de la tersupraĵo kaj plifortigis ĝian povon kontraŭ trosekeco kaj superakvo. En praktikado la sinteza reformo iom post iom perfektigis kaj ricevis pli kaj pli bonan efikon. Nun la kontraŭinunda kapablo de la eksperimenta regiono jam kvinobliĝis. En la tuta regiono la areo irigaciata per putoj kreskis de 16% al 90%. La areo de mezgrande kaj serioze alkaliĝintaj kampoj reduktiĝis de 67% al 7%. En iu somero pluvegis kvar tagojn sinsekve kaj la pluva kvanto atingis 280 milimetrojn. La plantaĵoj en nereformitaj kampoj jam velke kuŝis surtere, sed la maizoj en la eksperimentaj parceloj rekte staris. "Vera miraklo!" La proksimaj kamparanoj unu post alia venis al la eksperimentaj parceloj, palpante la fortikajn maiztigojn, ripetadis: "Tiel bone kreskantajn

plantaĵojn ni neniam vidis!" La fakto fine konvinkis ilin.

Dek du jaroj estas nur palpebruma daŭro en la historio. Sed la gubernio Ĉjuĝoŭ spertis grandan ŝanĝon, kian ĝi neniam spertis dum mil jaroj. Nun ĉ. 14 000 hektaroj da alkalaj kampoj estas radikale reformitaj. La pohektara grena produktokvanto kreskis de 1 500 kg. al 4 500 kg. La hektara grena produktokvanto de la vilaĝo Gangĝuang, kiu plej serioze suferis de alkalo, nun jam atingis 7 500 kg. Kaj la jara pokapa enspezo de la vilaĝanoj superis mil jŭanojn. La antaŭa alkala dezerto nun fariĝis grenejo.

En majo de 1985 pli ol dudek famaj grundologoj el dek kvar landoj venis al Ĉjuĝoŭ por esplorado. Ili certigis kaj laŭdis la reforman laboron de alkala tero. La asistanta-ĝenerala sekretario de la Internacia Societo de Grundaj Sciencoj, fama grundologo, prof. I. Szabolcs diris, ke la reforma laboro de alkala tero estas unuagrada.

Nun la instruistoj de la agrikultura universitato marŝas antaŭen laŭ tiu ĉi vojo.

S-ro Ŝin Dehuj (la dua de dekstre) konigas al eksterlandaj fakuloj la staton de alkalaj kampoj.



Kotonuoj sur bonigita alkala kampo



La Haleja kometo aperas refoje



La Haleja kometo

Vespere de majo 1910, en la okcidenta ĉielo vidiĝis hela ronda globo kuntrenanta grizan luman voston, kvazaŭ renverse pendanta

balailo. Ĝi estis la fama Haleja kometo.

La kometo ricevis la nomon en 1758. En 1682 aperis granda kometo sur la ĉielo. La angla astronomo Halley kalkulis la orbiton de la kometo laŭ la leĝo de universala altirforto kaj trovis, ke la kometa orbito estas tre proksima al tiu de la grandaj kometoj aperintaj en 1531 kaj 1607 respektive. Post esplorado li konstatis, ke la tri kometoj fakte estas unu sama, kaj antaŭdiris, ke ĝi aperos denove post 76 jaroj. Vere, en la fino de 1758 la granda kometo denove aperis sur la ĉielo. Tial oni nomis ĝin la Haleja kometo memore al lia granda merito.

iras ĉirkaŭ la suno. La diferenco estas en tio, ke la orbitoj de la terglobo kaj aliaj planedoj estas proksimume rondaj, dum tiu de kometo ĝenerale estas elipsa. La kometa strukturo estas kompare komplika. Ĝia centra kompakta kaj luma parto nomiĝas kometa kerno konsistanta el "glaciaj blokoj" (glaciĝintaj akvo, metano, amoniako kaj aliaj), ŝtonblokoj kaj polvo. La kometa kerno estas envolvata de nebula materio, tiu tavolo nomiĝas kometa hararo. Ili kune nomiĝas kometa kapo. En 1970 kiam artefarita satelito observis ekster la tergloba atmosfero du helajn kometojn, ĝi trovis ĉirkaŭ la kometa kapo hidrogenan tavolon kun dikeco de 5 milionoj da kilometroj. Kiam kometo proksimiĝas al la suno, sub la premado de la suna radiado la glaciĝinta materio puŝas la vaporiĝantan materion de la kometo en la direkto kontraŭa al la suno kaj formas la kometan voston. Ju pli la kometo proksimiĝas al la suno des pli longiĝas la kometa vosto. Kiam la kometo forlasas la sunon, la vosto malgran-

Solvoj por enigmoj:

1. violono, gitaro k.s.
2. roso.

Solvo por cifera ludo

$$\begin{array}{r}
 \begin{array}{|c|} \hline 1 \\ \hline \end{array} \quad \begin{array}{|c|} \hline 5 \\ \hline \end{array} \\
 \\
 \begin{array}{|c|} \hline 3 \\ \hline \end{array} \quad \begin{array}{|c|} \hline 6 \\ \hline \end{array} \\
 + \begin{array}{|c|} \hline 4 \\ \hline \end{array} \quad \begin{array}{|c|} \hline 7 \\ \hline \end{array} \\
 \hline
 \begin{array}{|c|} \hline 9 \\ \hline \end{array} \quad \begin{array}{|c|} \hline 8 \\ \hline \end{array} \\
 \\
 + \quad \begin{array}{|c|} \hline 2 \\ \hline \end{array} \\
 \hline
 1 \quad 0 \quad 0
 \end{array}$$


La periodo de la Haleja kometo estas 76 jaroj. Ĝenerale, homo povas vidi ĝin nur unufoje dum sia tuta vivo. La ĉi-jara apero de la Haleja kometo estas grava astronomia fenomeno en la lastaj jaroj de la nuna jarcento.

Malgraŭ sia kurioza aspekto la kometo estas membro de la suna familio. Kiel la terglobo ĝi rond-

diĝas iom post iom kaj t'ne malaperas.

Haleja kometo estas tre tipa kometo, kun senĉese moviĝanta kerno, densa hararo kaj giganta vosto. Tial ĝia ĉi-foja apero estas alte taksata de la internacia astronomia rondo. Por observi ĝin, la 15-a Komitato de la Internacia Astronomia Federacio — la "Internacia Haleja-kometa Observo" (IHO) mobilizis, organizis kaj gvidis la tutmondan surteran observadon, krome, ĝi lanĉis kosmoŝipon por fari proksiman observadon al la Haleja kometo. Du sovetiaj kosmoŝipoj lanĉitaj je la 15-a kaj la 21-a de decembro 1984 flugas al la Haleja kometo. Japanio lanĉis por tio du sondilojn. Usono lanĉis unu sondilon en la fino de 1984. La Eŭropa Kosmonaviga Buroo en la komenco de julio 1985 al la orbito sukcese sendis sondilon, kiu trapasos la hararon de la Haleja kometo kaj resendos al la terglobo koncernajn informojn kaj kolorajn fotojn. Ankaŭ ĉinaj fakaj kaj amatoraj astronomoj faris por tio seriozan preparon kaj partoprenas internaciajn observadon kaj mezuradon de multaj fakoj, kiaj ĉielkorpa mezurado, grandmezura fotografado, esplorado pri ĝia kerna proksimeco, spektra observado, fotomezurado, transruĝ-radia mezurado, radia observado kaj mezurado. La 4-an de novembro 1984 la Junnan-a Observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj sukcese faris, per sia unu-metra teleskopo kun altimpresigema fokusreguliga sistemo, klarajn fotojn de la Haleja kometo.

De komence de decembro 1985 ĝis fine de aprilo 1986 oni povas per nudaj okuloj vidi la Halejan kometon. La kalkulado montris, ke, antaŭ kaj post kiam la kometo preterpasos la perihelion, ĝi po-



1. La tero
2. Marso
3. Jupitero
4. Saturno
5. Urano
6. Neptuno
7. La Haleja kometo

unufoje plej proksimiĝos al la terglobo. La dato de ĝia pleja proksimiĝo al la terglobo antaŭ la perihelio estis la 27-a de novembro, 1985 kaj tiu de tia proksimiĝo malantaŭ la perihelio estos la 11-a de aprilo, 1986. Dum la tutaj noktoj de novembro, 1985 oni povis akiri materialojn dank' al observado al la kometo per teleskopo, sed ĝia heleco egalas al la stelo kun sepa grandeco, sub la okula vidpovo. En decembro la kometo fariĝis pli luma kaj videbla per la nudaj okuloj. La plej bona tempo por observi la kometon estos de la lasta tagdeko de marto ĝis la unua tagdeko de aprilo 1986. Tiam ĝi plej proksimiĝos al la terglobo kaj distanco de ĝi je ĉ. pli ol 60 000 km, kaj la maksimuma heleco atingos kvaran grandecon, ĝia vosto atingos sian plej grandan longecon kaj belecon. Tiam la dekli-

nacio de la Haleja kometo estos -47 gradoj de la ekvatora latitudo, kio estos utila al observado en la suda hemisfero. En la regiono de 20 gradoj de la norda latitudo, kie estas la urboj Meksiko, Bombajo, Kalikato, Kantono, Nanning kaj Kunming, la Haleja kometo estos ĉe ĉ. 30 gradoj super la horizonto kaj videbla pli klare. La koncernaj fakoj de Ĉinio stariĝis la plej bonajn observejojn en la insulo Hajnan kaj aliaj lokoj.



NI NULIGIS LA RUBRIKON "FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ"

Dum sia ekzistado nia rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj" ricevis grandan subtenon de niaj legantoj. Pro tio ni kore dankas ilin. Por kontentigi la deziron de nemalmultaj el ili aperigi aliflankajn kolorajn fotojn, ni nuligis la rubrikon "Fotoj Faritaj de E-istoj" jam en la unua n-ro de 1986. Do, ni ne plu bezonas kolorajn fotojn por tiu rubriko.

La Redakcio

Postleciona laborado de ĉinaj studentoj

En malgranda kabineto, kie streĉe laboras ses personoj ŝvitantaj pro varmo, iu 19-jara studento de la jur-sciencia fakultato de la Pekina Universitato ĝentile venis al mi. Salutinte, li donis al mi vizitkarton bonodorantan, sur kiu klare skribiĝas: "Nje Ŝjaŭdong, direktoro de la Fakoj de Inteligentec-ekspluato".

Kun okulvitroj en nigra kadro Nje Ŝjaŭdong aspektas multe pli matura ol sia aĝo. Videble, li estas tre kontenta pri sia laboro. "Nun mi estas tre okupita de laboro, sed senmanka en la spirito," li diris rapide. Ŝajnas, ke lia parolo postkuras lian viglan penson. "La ĉefa rolo de nia fakoj estas malfermi al la tuta socio la grandan inteligentan riĉfonton de la Pekina Universitato por ŝanĝi ties ferman staton."


En la Fakoj de Inteligentec-ekspluato laboras konstante kvar personoj, inkluzive Nje Ŝjaŭ-

dong, kaj kelkaj aliaj laŭbezone. La fakoj apartenas al la Sijuj-a Servo por Scienc-teknika Kulturo kaj Informo de la Pekina Universitato. La servo havas naŭ branĉojn kaj unu oficejon de ĝenerala direktoro, kun pli ol 30 laborantoj, inter kiuj estas esploraj studentoj, studentoj kaj instruistoj. Sub helpo de la servo multaj studentoj iris al la socio por dediĉi siajn sciojn al ĝi kaj iuj el ili partoprenas en fizika laboro. Ili ĉiuj ricevis rekompencojn.

Nuntempe tia postleciona laborado disvolviĝas en ĉinaj altlernejoj, kvankam oni havas malsamajn opiniojn pri ĝi. Iuj asertas, ke la ĉefa tasko de studentoj estas lerni kaj ili ne devas turni sian atenton al postleciona laborado, kaj aliaj opinias, ke partopreno de studentoj en la socia praktiko estas utila por ŝanĝi ferman edukadon kaj inokuli memstarecon al ili. Videble, la lastaj estas plimulto.

En la 20-30-aj jaroj oni faris similan postlecionan laboradon. Inter la ĉinaj gelnantoj partoprenantaj tian laboron siatempe en Francio estis famaj revoluciistoj Ĝoŭ Enlaj, iama ĉina ĉefministro, kaj Deng Ŝjaŭping, prezidento de la Centra Milita Komisiono.

En la lastaj jaroj ĉ. triono de la studentoj de Ĉinio partoprenis en diversaj postlecionaj laboroj. En Ŝenĝen, speciala ekonomia distrikto, studentoj de la Ŝenĝena Universitato laboras en postlecionaj horoj kiel akceptistoj, ĉiĉeronoj kaj transportistoj en stacidomo, doganejo kaj turisma servo por ĉinaj elmigrantoj; en Ŝanhajo, studentoj de la Ekonomika kaj Komerca Instituto organizis eksperimentan bazaron kun restoracio ĉinstila, kafejo kaj migranta vendejo; en Ĉongĉing, ĉiutage pli ol 300 studentoj de la Ĉongĉinga Universitato partoprenas en laboroj de biblioteko, laboratorio



Ŭang Ŭej (dekstre) instruas la anglan lingvon al knabo en lia hejmo.

kaj manĝejo kaj balaas la korton de la universitato, loĝdomojn de studentoj kaj iliajn klasĉambrojn; kaj en Hebej, iu provinca ĵurnalo anoncis, ke la Hebej-a Instruista Instituto proponas siajn studentojn kiel familiajn instruistojn, kio vekis grandan eĥon en la socio. Multaj personoj invitis tiujn studentojn per telegramoj kaj leteroj.

En la komenco la postlecionaj laboroj estis portempaj kaj disaj. Plejparto de studentoj okupiĝis pri simplaj fizikaj laboroj kaj iuj vendis ĵurnalojn sur stratoj aŭ librojn, vestojn kaj elektronajn horloĝojn en sia lernejo. Tamen, depost la someraj ferioj de 1984, la postleciona laborado transiris de emfazo de laborkapablo al tiu de inteligenteco kaj de portempeco kaj diseco al longdaŭreco kaj organiziteco. Lastatempe Pekino starigis oficejon por peri postlecionajn laborojn al siaj studentoj, kio multe favoris ilin tiuflanke. Ankaŭ diversaj altlernejoj establis unu post alia fondaĵojn por postleciona laborado administratajn de studentoj mem, ekz. la Hŭaŝi-a Scienc-teknika Servocentro de Ĉinghŭa-universitato, la Ŝinjŭan-a Scienc-teknika Eksploat-centro de la Pekina Politekniko, la Janda-a Scienc-teknika Eksploat-centro de la Pekina Malpezindustria Instituto kaj la Sijuj-a Servo por Scienc-teknika Kulturo kaj Informo de la Pekina Universitato.

Tiuj fondaĵoj havas sian propran konton. Ili estas protektataj de la leĝo kaj tre viglaj en la socio. La studentoj, kiuj partoprenas en la postleciona laborado, klopodas por rekte diskuti fakan laboron kun iuj entreprenoj, subskribi kontrakton kun ili kaj solvi iliajn malfacilojn. Ili akiris konfidon de nemalmultaj entreprenoj per siaj saĝo, sincereco kaj rapida

laborstilo. Pere de la Janda-a Scienc-teknika Eksploat-centro de la Pekina Malpezindustria Instituto, ties kvin esploraj studentoj subskribis kun iu pekina fabriko de bildotuboj kontrakton pri scienc-esplora projekto de kontrola sistemo de laborprocedo fari vakuon en bildotuboj per mikromaŝino kaj sukcese plenumis la projekton en nur du monatoj. Laŭ la kontrakto la fabriko pagis 1 000 jŭanojn (ĉ. tri jŭanoj egalas unu usonan dolaron) kiel rekompencan.

En Ŝanhajo la Donghŭa-a Studenta Scienc-teknika Asocio, organizo de postleciona laborado de studentoj de iu kemi-industria instituto, dufoje sendis studentojn enketi en vilaĝaj entreprenoj apartenantaj al la gubernio Ŝanhajo kaj trovis pli ol 20 problemojn, kiuj bezonis urĝan solvon. Reveninte al la instituto, ili elektis kvin en la problemoj kaj faris anoncon por akcepti talentulojn. Tuj 103 studentoj kaj pli ol 22 esploraj studentoj sin proponis por la afero. Unu el la kvin scienc-esploraj problemoj estis bone solvita, de sep studentoj en nur unu semajno. Iu fabriko de la gubernio tre ĝojis, ke aplikante ilian frukton, ĝi povas kreskigi 300 000-450 000 jŭanojn da profito ĉiujare.

En la praktiko la studentoj akiris laboran kaj korean kapablojn kaj tute novajn sciojn, ĉar ili kombinis la esploron kun sia fako. Ekz., al la supre menciitaj kvin esploraj studentoj de la Malpezindustria Instituto mankis praktika sperto, ĉar ili eniris, post ekzameno, el mezgrada lernejo en altlernejon kaj poste fariĝis esploraj studentoj. Dank' al scienc-esplorado en fabriko ili konis ĉiujn laborprocedojn de la fabriko, pliriĉigis siajn sciojn kaj impetis teorieton.

Oni multe rikoltis en la postleciona laborado. Liŭ Ĉjiĝŭo, studento de la oka fakultato de la Pekina Politekniko kaj vicdirektoro de la Servocentro de Postleciona Laborado de la fakultato, opiniis, ke lia plej granda rikolto estas, ke li sin hardis en organizado kaj kontakto. Kiel vicdirektoro, li estas tre okupita de laboro kaj lernado. Ofte kaptante 20 minutojn por lecionpaŭzo, li kuris al la sekcio de financaj aferoj por kvitiĝi aŭ al la oficejo de la politekniko por subskribi kontrakton. Malgraŭ tio, li ricevis tre bonajn notojn en sia lernado kaj, kiel eminenta studento, estos metita venontjare inter esplorajn studentojn.

Tamen, Ŭang Ŭej, studento de la fakultato de nacia politiko de la Pekina Universitato, diris al mi, ke lia plej granda gajno estas, ke li spertis instruistan vivon. Li instruis la anglan lingvon al iu 13-jara knabo en lia hejmo. "Antaŭe nur aliaj instruis kaj influis min, sed nun mi instruas kaj influas aliajn. Tio tre plezurigis min," li diris al mi kun rideto. "Kompreneble, en la komenco mi sentis min dungita kaj singena. Sed nun mi intimiĝis kun tiu familio, kaj la sento malaperis." Laŭ la kontrakto li ricevis 1.3 jŭanojn kontraŭ ĉiuhora instruado. Li daŭrigis: "Kvankam miaj gepatroj povas vivteni min, tamen mi sentas maltrankvilon, ĉar mi jam grandiĝis, sed ankoraŭ pagigis ilin." Ŭang Ŭej diris al mi korverŝe: "Kun mono mi povas riĉigi mian librobretaron per kelkaj valoraj libroj. Sed tuj kiam mi ekhavis senton al la knabo, mono ne plu interesas min kaj mi sentas devokonscion por la knabo. Mi bedaŭros, se mi ne bone instruos lin."

La studentoj-direktoroj de la Sijuj-a Servo por Scienc-teknika



En la Siĵu-a Servo por Scienc-teknika Kulturo kaj Informo

Kulturo kaj Informo laboras ĉ. du horojn ĉiutage kaj havas regulan enspezon de 35 jŭanoj ĉi monate, sed la ordinara laborantoj — 30 jŭanoj. Sed la direktoroj de la Ŝinjŭan-a Scienc-teknika Eksploat-centro enpoŝigis preskaŭ neniom. Ili donacis monon al la Briĝo-Asocio, la Teniso-Asocio k.a. Ili decidis doni parton de la monsumo al la Unua Simpozio de Ĉinaj Esploraj Studentoj pri Komputero kaj Ĝia Uzado iniciatita de ili en la someraj ferioj de la kuranta jaro.

Kompreneble, ne ĉiu postleciono

na laborado de studentoj iris glate. La Radio-klubo de iu altlernejo plendis, ke anstataŭ funkciigi laboratorion kaj liveri necesajn objektojn, la lernejo ordonis al la klubanoj senpage ripari surstrate elektrajn aparatojn por gajni bonan reputacion por ĝi. Ili sin ŝarĝis per plenumo de scienc-esplora projekto por iu fabriko en Fuĝjan, sed ili malsukcesis pro la malbona kvalito de sia laboraĵo, kiu ne atingis la normon difinitan de la fabriko. Ili ne nur vane laboris unu monaton, sed kompensis la perdon eĉ per sia manĝkosto.

Cetere, iuj entreprenoj en la socio estas indiferentaj al la postleciono laborado de studentoj, kio kaŭzas al ĉi tiuj malfacilojn tiuflanke. Por solvi la problemon, la Centra Nacimalplimulta Instituto en Pekino donas rekompencojn al siaj studentoj, kiuj laboras en stacidomoj kaj restoracioj.

Kvankam la postleciono laborado de studentoj estas ankoraŭ neperfekta, tamen ĝi rompita la tradicion de ferma edukado kaj vekis novan energion en ĉinaj altlernejoj.

(Daŭrigo de p. 32)

Tie la loĝkondiĉoj estas favoraj kaj trafiko facila. El la hoteloj en ĝi iuj bordas maron kaj staras apud monto, aliaj kaŝiĝas inter verdaj arboj kaj belaj floroj kaj triaj situas en la movoplena urbocentro. Inter ili Bangĉujdaŭ-hotelo en marbordĝardena stilo kaj Nanŝan-hotelo en stilo de korta vilao ambaŭ estas karesataj de kvieta medio kaj havas kompletajn instalaĵojn kun apartamentoj kaj ĉambroj por du personoj. En la urbo regas facila maro, tera kaj aera trafiko. Per ŝipo oni povas rekte atingi Ŝanhajon, Tjanĝin, Kantonon, Ĉingdaŭ, Jantaj, Longkoŭ kaj Ŭejhaj, per trajno oni povas rekte atingi Pekinon, Tjan-

ĝin, Ŝenjang kaj Harbin, kaj per aeroplano oni povas rekte atingi Pekinon, Ŝanhajon, Kantonon, Harbin, Ĉingdaŭ, Ŝenjang, Dandong kaj aliajn urbojn.

Kun la pluropaŝa malfermo de la urbo al aliaj landoj, ĝia turisma afero rimarkinde disvolviĝos. Nun la koncernaj departementoj de Daljan jam ellaboris longtempan, meztempan kaj mallongtempan planojn por disvolvi la turisman aferon. Laŭ la plano oni konstruos Daljan dum dek jaroj en ĉefan turisman urbon kaj surmaran turisman centron de Ĉinio. Nun en la tuta urbo streĉe iras konstruado de la bazaj turismaj instalaĵoj. Samtempe kun tio, oni konstruas aron da distraj instala-

ĵoj kaj ĉe la marbordo kaj insulo. La marakva banejo sub la Surmara Turisma Centro de Fuĝjaĝŭang jam havas rudimentan formon. La marproduktaĵa restoracio funkcias kaj la konstruado de la 12 turismaj punktoj ĉe la marborda vojo jam komenciĝis.

Ni varme bonvenigas turistojn el diversaj partoj de la mondo al Daljan. La turistoj, kiuj deziras vojaĝi al Daljan kaj aliaj ĉinaj urboj, povas kontaktiĝi pere de la lokaj turismaj servoj kun la Ĉina Internacia Turisma Servo, aŭ rekte kun la Daljan-a Filio de la Ĉina Internacia Turisma Servo kaj la Daljan-a Ĉina Turisma Servo. Kaj ilin favoros turismaj servoj de la urbo.

Konkurso de malgrandaj pianistoj

Sur la scenejon en la halo de la Centra Konservatorio de Pekino ascendis dika knabo. Aplombe li riverencis al la spektantoj kaj sidiĝis sur benko pere de benketo. Post momento da medito li sin kvietigis kaj solene komencis la ludon. Kune kun la movoj de liaj delikataj manoj, la bela melodio flugis al ĉiuj anguloj de la halo.

Li ludis unue "La Unua Movimento de Sonateto" de Betoveno kaj poste "Abelo kaj Trifolio". Kiam li saltis de sur la benko, la halo eksplodis per gaja rido kaj aplaŭdado.

Li estis Jangjang, sesjara, kiu komencis lerni pianludon antaŭ unu jaro.

Jen unu el la interesaj scenoj, kiujn mi spertis en la konkurso de infana pianludo okazinta en Pekino.

KONKURSO DE PROKSIMUME 300 INFANOJ

Tia konkurso estis la unuafoja en Pekino. Informiĝinte pri la konkurso, senĉese venis homoj kun siaj infanoj por enskribi ilin. Eĉ post la limdato ankoraŭ venadis gepatroj kun siaj infanoj por la sama celo. Iu el tiaj gepatroj petegis: "Nia infano lernis pianludon duonjaron. Donu al li

okazon sin ekzerci. Bonvolu enskribi lin."

En la konkurso partoprenis 296 infanoj. El ili la plej granda estis 12-jara kaj la plej malgranda havis nur tri kaj duonan jarojn; kaj cetere, pli ol duono de la infanoj aĝis malpli ol sep jarojn.

La konkursantoj estis grupigitaj laŭ aĝo. La unua grupo konsistis el infanoj 11-12-jaraj, la dua el 9-10-jaraj, la tria el 7-8-jaraj kaj la kvara el tiuj de malpli ol sep jaroj.

La plej alloga estis la konkurso de malgrandaj infanoj. Plejparto de ili ne povis sidigi sin sur benko per si mem, kaj tion devis helpi laborantoj de la konkurso. Foje 4-jara knabo ne povis trovi la komencan klavon pro timideco kaj la juĝistoj devis permesi al lia patro helpi lin sur la scenejo. La konfuziĝo de la knabo estiĝis pro tio, ke li ekzercis sin hejme per vertikala piano kaj nun staras antaŭ li granda horizontala. Sed baldaŭ li komprenis dank' al la monstro de la patro. Li sukcese finis la ludon. Kiam li kuris de sur la scenejo, lia patro ĝoje levis lin kaj kisis al li la vangon kun larmoj. Tio vekis gajan ridon en la halo.

Nun estis la vico de knabo Ŭang Jang portanta blankan kostumon kaj ruĝan kravaton. Li altiris al si grandan atenton de la spektantoj. Kvankam li havis malpli ol ses jarojn, tamen li aspektis tre aplomba kaj matura.

Li lerte ludis "La Senĉesa Galopo" de Striboger kaj "La Gurdo" de Portini. Lian ludon oni rekomencis per varma aplaŭdado.

Nun devis ludi Ŭang Lu, kiu aĝis nur kvar jarojn kaj ok monatojn. Kiam ŝi finis la ludon de "Turka Marŝo" de Betoveno, ŝi estis multe fotita de fotisto de la Usona Novajagentejo. Oni diris, ke ŝi faris sensacion en la publiko.

Post la 4-taga konkurso famaj ĉinaj pianistoj faris juĝon kaj premiis 38 infanojn.

La prezidanto de la organiza komitato por la konkurso estis iu vicurbestro de Pekino, la vicprezidanto de la komitato estis la honora direktoro de la Centra Konservatorio, kaj la juĝistaro konsistis el famaj ĉinaj pianistoj.

La bela ludado de la infanoj vekis grandan resonon en la muzikista rondo de Pekino. Pianistino Baŭ Hujĉjaŭ, kiu foje gajnis premion en internacia pianluda konkurso, diris kun emocio: "La infanoj ludis tre bone. Ilia nivelo estis ekster mia atendo."

INFANOJ EL ORDINARAJ FAMILIOJ

Piano, rigardada kiel "nobelo de muzikiloj", antaŭe estis malfacile trovebla en ordinara familio de Ĉinio. Sekve pianistoj devenis ĉefe de familioj de superaj intelektuloj, precipe de artistoj. Sed



Pianistineto en ludo



La gepatroj ĝojas pro sia premiita filino.

ĉi-foje pli ol kvinono de la ludantoj venis de ordinaraĵaj familioj. Pluraj el la premiitaj infanoj devenis de familio laborista, medicina aŭ teknikista.

La 6-jara knabino Lju Dongmeĵ, kiu sukcesis partopreni en la finalo de la konkurso, havas ŝoforon kiel sian patron. Ŝia patrino estas kontistino en fabriko. La patrino diris al mi: "Jam en la infaneco mi ekŝatis muzikon, sed tiam mi nur kantis. Kiam mia filino estis ankoraŭ bebo, mi metis apud ŝian oreilon radioricevilon, por ke ŝi aŭskultu muzikon. Ŝiaj manoj estas grandaj kaj fingroj elastaj. Ŝi estas sentema al muziko kaj ĝia takto, ke ni decidis, ke ŝi lernu pianludon."

Antaŭe la knabino estis nemontrigema, timida kaj silentema. En la infanĝardeno ŝi sidis ofte apude por eviti siajn kamaradojn. En intelektaj ludoj ŝi estis malpli rapida ol aliaj. Sed malpli ol duonjaron post sia eklerno de pianludo, ŝi fariĝis kuraĝa, pensema, pli saĝa kaj sprita ol antaŭe kaj povis rapide ellerni ion ajn.

"Ni esperas, ke nia filo fariĝos multepromesa," diris al mi la gepatroj de malgranda konkursanto Ŭang Ŝjaŭtaŭ. Ili estas ordinaraĵaj laboristoj kaj ne sciis muzikon.

Por klerigi sian infanon kaj havigi al li intereson pri muziko, ili puŝis lin al pianludo en lia 5-jara aĝo. Ili vivis ŝpareme kaj aĉetis pianon per 1 600 jŭanoj (ĉ. tri jŭanoj egalas unu usonan dolaron).

Ĉiusemajne Ŝjaŭtaŭ iris al la muzika kurso du-foje, akompanate de la gepatroj. Nenia vento nek pluvo povis malhelpi lin. Li multe progresis en pli ol unu jaro, kaj ankaŭ la gepatroj akiris multajn sciojn pri muziko ĉe la instruisto.

La filo de ŝtatoficisto Li Juŝjŭan eklernis pianludon en la aĝo de tri jaroj. S-ro Li diris, ke li kaj lia edzino estas muzik-amanantoj. Tamen ili ne esperas, ke ilia infano fariĝos fama pianisto, sed male, sciencisto, ĉar multaj famaj sciencistoj estis bone klerigitaj en muziko, ekzemple Einstein tre ŝatis muzikon. Tio edifis ilin kaj ili decidis, ke la filo lernu muzikon. S-ro Li trovis, ke la filo povas rapide kapti muziknotojn kaj havas bonan memoron. Cetere la infano kontentige progresis en akordigo de ambaŭ manoj. Kiam li volis iri sur la scenejon por pianludo, la patro diris al li kun rideto: "Ne estu tiel malpacienca. Antaŭ ol partopreni en konkurso, vi devas pli bone lerni."

GRANDA DEBITO DE PIANOJ

En la lastaj jaroj, kun la disvolviĝo de ekonomio, ŝanĝiĝis ankaŭ la materiala vivo kaj la strukturo de la scioj de la popolo. Nemalmultaj el la pekinaj loĝantoj pretis aĉeti pianon. Jam ne sensacias la novaĵo, ke kamparano aĉetis pianon. Nun la pianoj en la urba merkato ne povas kontentigi la bezonon de klientoj. Oni diris, ke jam pli ol 20 000 homoj mendis pianojn.

En Pekino aperis multaj muzikaj lernejoj kaj kursoj por infanoj, funkciigataj de la ŝtato aŭ de individuoj. En 1984 en la urbo estis pli ol 70 muzikaj lernejoj kaj kursoj, el kiuj pli ol 40 instruis al infanoj ludon de piano, violono, akordiono kaj ĉinaj naciaj muzikiloj, kaj muzikan teorion kaj kantadon. La lernejoj kaj kursoj havis milojn da lernantoj.

Estas menciinde, ke tia situacio videblas ne nur en Pekino. En aliaj grandaj urboj, kiel Ŝanhajo, Kantono, Tjanĝin kaj Ĉengdu, okazis pluraj pianludaj konkursoj de infanoj. La celo de la konkursoj estis altigi la muzikan klarecon de la infanoj, disvolvi ilian intelekton kaj kulturajn eminentajn pianistojn por la ŝtato.

Por Savi Infanon

Iom post la deka nokte, ĉe malgranda haltejo apenaŭ haltis ordinara trajno kondukanta al Pekino, tri personoj kun ĉ. unujara infano haste envagoniĝis. Ili estis la gepatroj de la infano kaj kuracisto.

La trajno ekiris. La kuracisto tuj diris al kondukto: "Posttagmeze la infano ensuĉis maiz-grajnon en la traŝejon. Mi kore petas vian helpon, ke por savi la infanon la trajno kiel eble plej frue atingos Pekinon."

La kondukto senprokraste raportis tion al la trajnestro, tiu ĉi pridemandis la gepatrojn pri la infano. La estro decidis raportiti tion al sia superulo kaj peti de li kontakti kun koncerna hospitalo, por ke ĝi preparu urĝsavon, tuj post kiam la trajno atingos la sekvantan haltejon.

Anoncistino de la trajno donis la informon, kaj multaj pasaĝeroj vizitis la infanon kaj petis, ke la trajnestro ordonu veturigi la ordinaran trajnon kiel ekspresan.

La malsano de la infano pli kaj pli graviĝis. Por ĝi tempo signifas vivon.

La trajno haltis, kaj la estro telefonis al sia superulo, kiu konsentis pri lia peto kaj faris la ŝanĝon. Samtempe, la kondukto faris bonan aranĝon por aliaj pa-


saĝeroj, kiuj devis elvagoniĝi ĉe iuj haltejoj.

Forte kortuŝite de tio, la patro diris: "Por savi mian filon vi faris la ŝanĝon. Pri tio mi eĉ ne kuraĝas pensi . . ." Li ne povis diri pro emociiĝo.

La trajno preterpasis haltejojn unu post alia, kaj antaŭtempe atingis Pekinon. La ambulanco, kiu atendis ilin longan momenton, rapide veturigis la infanon al la hospitalo.

Apenaŭ oni portis la infanon en la operaciejon, kuracistoj faris la operacion kaj elprenis la maiz-grajnon. La infano estis savita! La kuracistoj diris: "Se la trajno alvenus malfrue, la infano estus nesavebla!"

Por danki la fervojistojn, pasaĝerojn kaj kuracistojn, la gepatroj alinomis sian infanon Zajŝeng (Reviviĝinto).



Tarifo: unu internacia respondkuponon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * Volgograda urba interklubo "Esperanto", Zsajev Oleg, Nikolajevič, Ĉefpoŝto Post restante, Volgogrado-66, Sovetio 400066, deziras trovi ĉinajn esp.-amikojn.
- * 14-jara Tomasz Stuszniak, ul. E. Orzeszkowe 42/8, 50-311 Wroclaw, Pollando, deziras korespondi kun ĉina knabo aŭ knabino.
- * Tutmonde precipe el Irano kaj Rumanio, Fulvio Scarpa, Fondo Versace, 3TR24-89100, Regio Calabria, Italio.
- * 50j. Dvoran Lad., Str. Khejence, Nr. 675/A. Sezimovo Usti II. ĈS-39102, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun ĉino kaj hindo pri foto kaj radio.
- * Ni esperantistoj de Oroshaza en Hungario deziras korespondi kun esperantistoj el Ĉinio pri diversaj temoj, Nyilas Istvanne, Oroshaza, Hajnal u. 10, H-5900, Hungario.
- * Dr. Blahova Libuse, 14100 Posta Praha 41, pk 13, ĈSSR, vol. kor. kun amikoj el Ĉinio pri Esperanto, vojaĝo, muziko, arto kaj naturo.
- * 15-jara irana f-ino volas korespondi tutmonde pri muziko, scienco kaj aliaj temoj. Shahla Seyfi, 290 Iran-Reform, Kh. Kargar Ganubi, Tehran 13-166, Iran.
- * Erika Varga, Oroshaza, Marcius 8 Ter 9. 5900 Hungario, deziras korespondi kun knab(in)oj kaj interŝanĝi bildkartojn.

Novicoj

(Mikronovelo)

La juna flegistino Ŭang puŝis instrumentoĉaron antaŭ la malsanulan ĉambron kaj pretis puŝi la pordon, sed subite ŝi retiris la manon.

Ŝi devis fari injekton al nova paciento. Por malnova flegistino tio ja estas laboro tro simpla, sed por ŝi, ĵus veninta al la posteno, ne tiel facila. Antaŭ nelonge, por fari injekton al virino, ŝi faris sep pikojn en ŝian brakon, sed ankoraŭ ne sukcesis. Nun ŝi denove devis fari tion al virino, kaj ŝi sentis timemon.

Post momenta hezito, ŝi fine ekhavis kuraĝon por malfermi la pordon. Subite ŝi vidis, ke la pacientino senmove staras antaŭ la fenestro tenante la brakojn horizontale levitaj. Strange! Kion ŝi faras? Ŝi iris pli proksimen al ŝi kaj vidis, ke ŝi tenas pomon en la maldekstra mano kaj tranĉileton en la dekstra. La dekstra pojno senĉese moviĝis, sed la tranĉileto neniam tuŝis la pomon. La pacientino mallevis la brakojn kaj salutis ŝin per ĉarma rideto, nur kiam Ŭang iris apud ŝian liton. Vidinte ŝian alabastran vizaĝon. Ŭang miris: "Ho, estas ŝi!"

Ŭang rekonis, ke ŝi estas la juna frizistino. Antaŭ nelonge

Ŭang iris frizigi al si la harojn. Ŝi longe vicatendis kaj fine venis al ŝi juna frizistino preskaŭ samaĝa kiel ŝi. Ŭang ne fidis je ŝia tekniko. Kiam la frizistino malvolvis la tukon kaj petis ŝin sidiĝi, ŝi sinĝene almontris pliaĝan friziston kaj diris: "Ni jam antaŭkonsentis, ke li frizu al mi. . ." La frizistino tute ne ofendiĝis de la rifuzo kaj diris ĝentile: "Bone, sed bonvolu iom atendi." Kaj post momento ŝi flustre aldonis: "Li frizas tre bone, vi certe kontentiĝos pri lia tekniko."

Ĉe la rememoro Ŭang ekkomprenis kaj diris: "Ĉu vi ĵus ekzercis vin pri razado?"

"Jes, vi trafe konjektis," la pacientino diris en trankvilo. "Kiam mia majstro lernis la metion, li pendigis siajn brakojn per du maldikaj fadenoj kaj senĉese movadis la pojnon. Mi estas no-

vico kaj devas pli multe ekzerci min, alie mi ne povus lertiĝi en la metio. . ." La vortoj estis tre ordinaraj, tamen ili frapis la kordon de Ŭang kiel peza martelo.

Ŭang faris preparon kaj sterilizon, sed kiam ŝi prenis la injektilon, ŝi trovis malfacile injekti la diketan frizistinon. La koro de Ŭang pli forte streĉiĝis. Rimarkinte, ke la manoj de Ŭang tremetis, la frizistino demandis kun rido: "Ĉu malfacile? Nenio grava. Estu kuraĝa!" "Ne," diris Ŭang, "ĉu mi venigu spertan flegistinon?" "Ne, se vi ĉiam retiriĝos antaŭ malfaciloj, do kiam vi lertiĝos en la tekniko?" Ŝi etendis la brakojn kaj kuraĝigis ŝin sincere: "Provu, ni ambaŭ estas novicoj. . ."

La injektilo, tre malpeza por Ŭang antaŭe, nun kvazaŭ fariĝis neporteble peza.

(Esperantigis Ŭang Ŝijong)



Dommastro for de l' okuloj


(Mikronovelo)

Septembre bonodoris orangaj osmantoj. Post kiam teknikisto de mezurila fabriko Gu Jing kaj lia novedzino Ĉjan Jufen pasigis feliĉan jaron en iu pruntita domo de antaŭurbo, ili ricevis novan domon de la fabriko kaj estis gaje preparantaj la transloĝiĝon.

Ĉjan jam gravediĝis. Ilia feliĉa bebo naskiĝos en la nova domo. Kiel neforgesebla estas la malnova domo! "Ni devas kvitiĝi kun la dommastro!" ŝi emocie diris al sia edzo.

Antaŭ unu jaro la 33-jara Gu Jing tiel maltrankviliĝis pri serĉado de loĝejo kiel formiko sur varmega poto. Li kaj Ĉjan sin amis reciproke jam du jarojn. Ĉio estas preta, krom loĝdomo! Timante, ke la problemo de loĝdomo ĉesigos la am-rilaton, Gu Jing preferis lui privatan domon per alta prezo. Pere de sia iama kunlernanto Ĝoŭ Ĝihong, li luis la supre menciitan domon. Ĝia mastro estis entuziasma kaj malkaŝema junulo. Pri lu-prezo li senĉese kapskuis: "Mi luigis la domon nur por solvi vian ekstreme urĝan problemon. Mi ne postulas lupagon! Mi ne. . ." Tio mirigis Gu Jing. Por respondi lian bonkorecon, li montris al la mastro foton de sia fianĉino. Kaj estis neatendite, ke antaŭ la foto la mastro surpriziĝis. Post tio li ne plu aperis kaj konfidis sian aferon al kolego Ĝoŭ Ĝihong.

Gu Jing invitis la dommastron al sia geedziĝa festo. Sed anstataŭe venis liaj gratulaj vortoj kaj



pejzaĝa bildo, kiujn Ĝoŭ Ĝihong transdonis al la novgeedzoj. En la festonokto, kiam Gu Jing dolĉe dormis karesate de lunlumo tra la fenestro, lia edzino gape rigardis la pejzaĝan bildon donacitan de la nekomprenebla dommastro kaj pretervole ekpensis pri Liŭ Ŝin, ŝia iama amato en kultivejo.

Ĉjan Jufen kaj Liŭ Ŝin travivis ses jarojn en la kultivejo. Post kuna peniga fizika laborado ili ĵuris eternan amon unu al la alia, starante en frosta vento el fragmitejo. Ili diris el la profundo de la koro, ke "la unua amo signifas la amon dum la tuta vivo." Poste Ĉjan Jufen iris en urbon kaj fariĝis laboristino de la mezurila fabriko. Sed la situacio de Liŭ Ŝin ne ŝanĝiĝis. Ĉjan Jufen atendis lin du jarojn. Ŝi pensis, ke li ne havos eblecon labori en la urbo, kaj rompita kun li pretekste, ke ili havas malsamajn karakterojn.

Remaĉante la paseon, Ĉjan Jufen sentis sin ne en sia elemento. La bildo sur muro vekis ŝian rememoron pri la pentraĵo "Hŭangŝan-monto en Nubaro" farita de Liŭ Ŝin en la kultivejo. Kiel similas tiu al la pendanta!

Unu tagon antaŭ la transloĝiĝo la geedza paro iris al la hejmo de

Ĝoŭ Ĝihong. Ili diris al li, ke ili insistas renkontiĝi kun la dommastro. Post momenta hezito Ĝoŭ serioze transdonis leteron al Ĉjan Jufen, dirante: "Ĉjan, eble traleginte la leteron, vi povos vidi, kial li ne aperas plu."

Ĉjan Jufen haste prenis la leteron por legi. Sur la blanka papero skribiĝis: "Jufen, mi decidis ne plu aperi, post kiam mi informiĝis, ke estas vi, novedzino, kiu deziras prunti mian domon por geedziĝo. Do mi diris al Ĝoŭ, ke li tenu tion en sekreto. Se vi sciis, ke mi estas la mastro de la domo, vi certe ne pasigus tie vian mielan tempon. Nun vi fine ricevis kontentigan domon de via fabriko. Mi kore gratulas vin kaj partoprenas vian ĝojon pro la transloĝiĝo. Eternan feliĉon al vi. Liŭ Ŝin."

Ĉjan Jufen tralegis la mallongan leteron. Ektremis ŝiaj delikataj fingroj pro forta kor-batado. Kiam ŝi hezitis ĉe la vojkruciĝo de la amo du jarojn kaj decidis rompi kun la malfavorata Liŭ Ŝin, ŝi ne ploris, ĉar ŝi kredis, ke la homoj estas ĉiuj egoismaj. En tiu ĉi momento ŝi ne povis sin deteni de torentaj larmoj. . .

(Esperantigis Lu Binsheng)

KURANTAJ AFEROJ

LA 30-A DATREVENO DE LA FONDIĜO DE LA SINGĜANG-A UJGURA AŬTONOMA REGIONO

La 1-an de oktobro en la pasinta jaro 150 000 diversnaciecaj loĝantoj de Urumĉi solene kunvenis por varme celebri la 36-an datrevenon de la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la Singĝang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. La Centra Komitato de KPC sendis al la kunveno gratulan telegramon kaj sian delegacion al la celebrado.

Post la paca liberiĝo en 1949, precipe post la fondiĝo de la aŭtonoma regiono en 1955, dank' al la penado de la diversnaciecaj popolanoj de Singĝang, okazis en ĝi grandega ŝanĝiĝo. La agrikultura produktovaloro de 1984 kreskis 3.3-oble kompare kun tiu de 1955 kaj la totala industria produktovaloro de tiu jaro kreskis 14.6-oble. En la urba konstruado, trafiko, agrokultura irigaciado, kulturo, edukado kaj higieno oni metis bonan bazon por konstrui Singĝang en unu el la plej gravaj bazlokoj de nia socialisma modernigo. Nun en la regiono regas paco kaj solidareco en la politiko, prospero en la ekonomio kaj kulturo. Evidente leviĝis la materia kaj kultura vivo de la loĝantoj. Nun estas la plej bona en la historio ankaŭ la tiea nacia unuiĝo.

53 SURTERAJ SATELITAJ TELEVIDSTACIOJ FUNKCIIGATAJ

En la mezo de septembro, 1985 ekfunkciis la 53 surteraj satelitaj televidstacioj donacitaj de la Centra Komitato de KPC kaj la Ŝtata Konsilantaro al la foraj, mon-

taraj kaj nacimalplimultaj regionoj.


La stacioj estas dislokitaj en 16 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj, kie oni ne povas akurate aŭ bone ricevi la programon de la Ĉina Centra Televido. El tiuj lokoj troviĝas Fujŭan de la provinco Hejlongĝjang, la plej orienta gubernio de Ĉinio, Kaŝi de Singĝang, la plej okcidenta urbo de Ĉinio kaj Laŭŝan kaj Ĝejinŝan, la landlimaj regionoj de Junnan-provinco. La plej alta stacio estas konstruita sur Cangŝantaj 4 098 metrojn super la marnivelo,

kiu situas en Dali, Junnan-provinco.

LA PRODUKTAJ PLANOJ DE 6 ĈEFAJ INDUSTRIAJOJ ANTAŬTEMPE PLENUMITAJ

Ĝis la fino de aŭgusto, 1985 la jaraj produktaj planoj de 6 ĉefaj industriaĵoj de Ĉinio estis jam plenumitaj. La industriaĵoj estis televidiloj kaj magnetofonoj, kiuj havas grandan debiton en la urba kaj kampara merkatoj, dizelo kaj man-traktoro, kiuj estas urĝe bezonataj de transportado kaj agrikultura produktado, kaj ci-

La Surtera Satelita Televidstacio en Lhasa, Tibeto





Koloraj bildotuboj kontrolataj

feroprogramo-regata ilmaŝino kaj mikro-komputilo, kiuj estas pli kaj pli vaste uzataj en la moderna konstruado.

En la antaŭaj ok monatoj de la pasinta jaro Ĉinio produktis sume 10 560 000 televidilojn, je 77.1% pli multe ol tiuj en la sama periodo de 1984, inter ili la koloraj televidiloj kreskis 2.4-oble. La produktokvanto de magnetofonoj preskaŭ du-oble kreskis kompare kun tiu en la sama periodo de 1984. La produktokvanto de mantraktoroj atingis ĉ. 600 000, je pli ol 30% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1984. Samtempe kun tio, la produktokvanto de dizeloj kreskis je 55.7%. Ĝis la fino de la lasta aŭgusto la produktokvanto de ciferoprogramo-regataj ilmaŝinoj plenumiĝis 185.5% de la jara plano. La mikrokomputiloj pli multiĝis 1.7-oble ol tiuj en la sama periodo de 1984.

PROGRESAS LA ŜOSEA KONSTRUADO EN NORDOKCIDENTO

En la Nordokcidento de Ĉinio, kiu havis ege malfacilan trafikon en la pasinteco, nun la trafikaj kondiĉoj rimarkinde pliboniĝis. Jam formiĝis ŝosea reto, kiu kondukas al ĉiuj anguloj. Hodiaŭ oni povas atingi Lhasa, la ĉefurbon de Tibeto, post nur kvintaga aŭtoveturado, kiu komenciĝas de Ŝjian, antikva ĉefurbo de Ĉinio, laŭ la nove rekonstruita Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo.

Laŭ statistiko, la totala longeco de la ŝoseoj en Senŝji, Gansu, Ĉinghaj, Ningŝja kaj Sinĝjang estas pli ol 125 000 km. Ĉiuj gubernioj havas ŝoseojn. Oni povas rekte atingi per aŭto 88% de la urbetoj kaj subdistriktoj en la Nordokcidento. Nun jam formiĝis ŝosea reto kondukanta al ĉiuj partoj de la Nordokcidento



La aŭtostacio de Ŝjining, la plej granda en nordokcidenta Ĉinio

kun la urboj Ŝjian, Langou, Ŝjining, Jinĉuan kaj Urumĉi kiel centroj. Krome funkcias kvar ŝoseoj, kiuj kondukas al Sovetunio kaj Pakistano.

LA PLEJ GRANDPOVA ELEKTRA LOKOMOTIVO DE ĈINIO PROVFARITA

La elektra lokomotivo "Ŝaŝan — 4" projektita de Ĉinio mem jam estas provfarita de la Guĝou-a Elektralokomotiva Fabriko. Ĝia povo estas 6 400 kW, la starta tirforto 64 tunoj, la maksimuma rapideco 100 km. hore. Ĝi povas kuri 90 km. hore, kun vagonaro kun pezo de 7 000 tunoj, sur ebena fervojo. Ĉinio sukcesis en la provfarado, tio plenigis la mankon de grandpova lokomotivo en Ĉinio kaj kreis favorajn kondiĉojn disvolvi fervojan kargokapablan transportadon de Ĉinio.

ĈINIO APROBIS NOVAN LEĜON

La 6-an de septembro, 1985, la 12-a Sesio de la Konstanta Komitato de la Sesa Ĉina Popola Kongreso decidis, ke Ĉinio aliĝos al la Internacia Konvencio pri Preventado de Mara Polucio Kaŭzita de Sutado de Rubo kaj Aliaj Materioj, kiu estis subskribita en Londono, Meksiko, Moskvo kaj Vaŝingtono, la 29-an de decembro, 1972.

LA INSTRUISTA TAGO DE ĈINIO

La 10-a de septembro de la lasta jaro estis la unua Instruista Tago de Ĉinio. La ĉinaj instruistoj solene kunvenis por celebri sian feston. Ŝtataj gvidantoj ĉeestis la celebran kunvenon okazigitan en Pekino kaj faris varman gratulon al la instruistoj de la tuta lando.

Difini la daton kiel la Instruistan Tagon estas grava paŝo de la ĉina registaro por altigi la socialan pozicion de la instruistoj kaj alte taksigi la edukan laboron al la tuta socio. Krom tio, la ĉina registaro jam prenis aktivajn rimedojn por pliigi salajron de la ins-

truistoj kaj plibonigi iliajn loĝdomojn kaj aliajn vivkondiĉojn.

SURROKAJ FRESKOJ TROVITAJ EN GUJĜOŬ-PROVINCO

En 1985 oni trovis grandnombrajn surrokajn freskojn ĉe la rivero Nangaŭ en la gubernio Dangaj kaj ĉe la rivero Ĉingŝuj en la gubernio Kajjang de Gujĝoŭ-provinco. La surrokaj freskoj en Kajjang estas dislokitaj sur kruĵo 5.5 m. alta kaj 16 m. larĝa, kie estas bonorde aranĝitaj pli ol cent okraj bildoj pri homoj, ĉevaloj, cignoj, anasoj kaj la suno, kies grandeco varias de 0.1 ĝis 0.33

kvadrata metro. Ili aspektas sufiĉe impone.

Nun tie vivas mjaŭ-oj kaj bujioj. La freskoj prezentas multajn belajn legendojn. Tamen al kiu epoko apartenas la freskoj kaj kiu nacieco kreis ilin, tio restas ankoraŭ enigmo eĉ hodiaŭ. La koncernaj departementoj turnis grandan atenton al tiuj historiaj restaĵoj kaj alprenis rimedojn por ilin protekti.

"TIBET-HANA VORTARO" ELDONITA

En 1985 la Nacimalplimultlingva Eldonejo de Ĉinio eldonis grandan vortaron "Tibet-hana Vortaro", kiu estas altvalora sinteza referenca libro por ĉinaj kaj fremdlandaj tibetologoj en ilia studo pri Tibeto. Antaŭe la tibetologoj ĝenerale uzis "Tibet-anglan Vortaron" kompilitan de hindo Sarat Chandra Das en 1902.

La vortaro, kompilita ĉefe de ĉina tibetologo Ĝang Jisun, havas en si vortojn kaj sciojn pri la tibeta lingvo, ĉiutaga vivo, kulturo kaj scienco kaj estas aranĝita laŭ la ordo de tibetlingvaj literoj. La vortaro en tri volumoj kaj kun ĉina traduko enhavas 53 000 artikolojn kun 3 milionoj da vortoj.



Festado de la Instruista Tago

Nun la eldonejo preparas sin por eldoni ĝin en reduktita formato.

DU ITALAJ OPEROJ EN PEKINO

En la lasta septembro artistoj de la Ĉina Centra Operejo prezentis du famajn italajn operojn al pekinaj spektatoroj. Ili estis la komedio "Gianni Schicchi" de G. Puccini kaj "Klaŭnoj" de R. Leoncavallo. La itala operisto Gino-Becchi estis invitita de la Ĉina Centra Operejo kiel ĉefreĝisoro de tiuj du operoj, kaj ankaŭ Ŝi Ŝinĝi, usonano kaj direktisto ĝuanta reputacion en Eŭropo, Ameriko kaj Hongkongo, estis invitita kiel direktisto. La prezentado ricevis varman aplaŭdon de la spektatoroj

Sceno el la itala opero "Klaŭnoj"




AŬSTRIA KORD-INSTRUMENTA KVARTETO EN PEKINO

Septembre de la pasinta jaro la Trupo de Kord-instrumenta Kvarteto Haydn-Quartett Eisenstadt, veninta de la muzika lando Aŭstrio, faris dufoje prezentadon en la Nacieca Kultura Palaco de Pekino, kio ricevis varman aplaudon de pekinaj kultura kaj artista rondoj kaj spektatoroj.

La trupo estis fondita en 1969 de violonisto Werner Ehrenhofer. Ĝi prezentis en artfestoj de Aŭstrio, Jugoslavio, F.R. Germanio kaj Britio.

ĈINIO GAJNIS 19 MEDALOJN EN LA MONDA STUDENTA SPORTKUNVENO

La 13-a Monda Studenta Sportkunveno okazis de la fino de aŭgusto ĝis la komenco de septembro de 1985. La ĉina delegacio gajnis ses orajn, sep arĝentajn kaj ses kuprajn medalojn, kaj okupis la kvaran lokon en la sportkun-




Lŭan Ĝjuĝje (maldekstre) en konkurso

veno laŭ la nombro de la akiritaj medaloj. La ĉina sportisto Hŭang Ŭofu kaj la sovetia sportisto Bilozerche kune gajnis la ĉampionecon de la vira grunda gimnastiko. Lŭan Ĝjuĝje gajnis la ĉampionecon de virina rapirado,

Tan Ljange — la ĉampionecon de vira saltotabuloplono, Tong Huj — la ĉampionecon de vira turplono kaj Lju Ŭej — la ĉampionecon de virina turplono. La Ĉina Virina Plonga Teamo gajnis la teaman ĉampionecon.



LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Ningbo
2. Hangĝoŭ
3. Suĝoŭ
4. Ŝanhajo
5. Daljan

Antikvaj ŝipoj de Ĉinio

Ĉinio estas unu el la landoj kun plej longa historio de ŝip-konstruado. Arkeologoj trovis lignajn remilojn kaj argilajn ŝip-modelojn en pluraj neolitikaj ruinoj. Almenaŭ antaŭ 6 000-7 000 jaroj aperis pirogoj en Ĉinio. Flosoj aperis ankoraŭ pli frue. En malsamaj lokoj antikvaj ĉinoj iam uzis kanuojn, kajakojn, felsakajn flosojn, fragmitajn boatojn kaj aliajn primitivajn surakvajn veturilojn.

Vorto  en hieroglifo sur bovaj skapoloj kaj testudaj ŝeloj de Ŝang-dinastio (16-11 jc. a.K.) signifas "ŝipon". Tio montras, ke la tiama ŝipo estis konstruita el pluraj lignaj tabuloj. Iuj specialistoj opiniis, ke vorto  en hieroglifo sur bovaj skapoloj kaj testudaj ŝeloj signifas "velon".


Antikvaj literaturoj de Ĉinio diris, ke iu reĝo de Ŝja-dinastio (ĉ. 21-16 jc. a.K.) "ĉasis ĉe la orienta maro kaj kaptis fiŝegon". Okcidentaj fakuloj opiniis, ke antaŭ Kolombo ĉinoj jam atingis Meksikion.

Kun naskiĝo kaj firmiĝo de la unueca feŭda imperio la ŝipkonstrua tekniko grave progresis en la dinastioj Ĉin kaj Han (221 a. K. -220 p. K.). Multe disvolviĝis la specoj, povo-instalaĵoj, direktiloj, adaptiĝemo k.a. de ŝipoj. Han-imperio povis unufoje sendi 2 000 kvar-etaĝajn grandajn ŝipojn kun 200 000 surakvaj militistoj. En Han-dinastio oni ek-


uzis julon por puŝi ŝipojn antaŭen. Julio estas transformita el remilo kaj funkcias kaj kiel remilo kaj kiel rudro. Elterigitaj historiaj objektoj montras, ke la tiama ŝipoj estis jam instalitaj per ŝtonaj ankroj kaj per rudro ĉe la pobo. Julio kaj poba rudro ambaŭ estis inventitaj de antikvaj ĉinoj. Nur en la 12-a jc. la ĉina poba rudro estis enkondukita en Mediteraneon tra la Hinda Oceano. Historiaj literaturoj montras, ke la imperiestro Udi (140 a.K. -87 a.K. en trono) de Han-dinastio foje sendis ŝiparon veturi de Gŭangdong, tra la Suda Ĉina Maro kaj Malaka Markolo, al Indonezio, Birmo, Srilankao kaj Hindio.

En la periodo de la Tri Regnoj (220-265 p. K.) la regno U havis pli ol 5 000 militŝipojn en 5 specoj, inter kiuj grandaj ŝipoj estis 5-etaĝaj kaj povis veturigi 3 000 militistojn. La militŝipoj de U-regno iam veturis al la insulo Tajŭan kaj en la Suda Ĉina Maro. La tiama oceana ŝipo havis maksimume 7 velojn.


En Tang-dinastio en la 7-a jc. Ĉinio povis konstrui grandan oceanan velŝipon 5-ferdekan. Li Gaŭ inventis ŝipon antaŭen puŝatan per remradoj, kiu estis rudimento de la moderna ŝipo. Fama araba navigisto Sulayman al-Tajir en la 9-a jc. registris, ke la marŝipoj de Tang-dinastio, tre grandaj kaj fortikaj, povis glate traveturi la Persan Golfon. La tiamaj



Argila ŝipo farita en 25-184 p.K.




Ŝipo kun dek ses remiloj farita en 206 a.K. — 24 p.K.




Militŝipo farita en 960-1279 p.K.

ĉinaj ŝipoj frekventis landojn ĉe la Ruĝa Maro por fari negocon. Tiu surmara "silka vojo" multe akcelis la amikan interŝanĝon de ekonomio, kulturo, sciencoj kaj tekniko inter Ĉinio kaj aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Eŭropo. Song-dinastio (960-1279 p. K.) estis la plej prospera periodo de ŝip-konstruado en la antikva Ĉinio. Tiam en Ĉinio veturis pli ol 1 000 specoj de militaj kaj ko-



Grenotransporta ŝipo



*Felsaka floso uzata ankoraŭ nun-
tempe*

elterigis mezgrandan ŝipon 35 metrojn longan, kiu vive atestis la avangardan ŝip-konstruan teknikon de Ĉinio. Krom Ĉjüangou ankaŭ la havenoj Kantono, Ningbo siatempe estis mondfamaj komercaj havenoj.

La majstroverko de la ĉina ŝip-konstrua tekniko en la 15-a jc. estis la grandaj ŝipoj per kiuj Ĝeng He navigis al la Okcidento (legu la artikolon "Pioniro Pretiganta Silkan kaj Porcelanan Marvojon" n-ro 12, 1985). El lia floto estis ŝipo 150 metrojn longa kaj 60 metrojn larĝa kun 9 mastoj kaj 12 veloj. Ĝi povis veturigi 1 000 homojn. La 11.4-metra rudostango de Ming-dinastio, elterigita en la ruino Longgjang de Nankino en 1957, estis tiu de la plej granda ocean-ŝipo en la tiamamondo. Inter 1405-1433 la floto komandita de Ĝeng He 7-foje navigis okcidenten kaj atingis pli ol 30 landojn kaj regionojn de la sudorienta Azio, la bordo de la Hinda Oceano kaj orienta Afriko. Per tio li skribis brilan paĝon en la historio de la monda navigado.


De post la 16-a jc. la ŝipkonstrua tekniko de Ĉinio disvolviĝis malrapide kaj iom post iom estiĝis post la Okcidenta Eŭropo.

mercaj ŝipoj inkl. de varmoŝipoj, glacirompaj ŝipoj, dragŝipoj kaj aliaj specifaj ŝipoj. La oceanŝipo konstruita en Song-dinastio estis granda, bonkvalita. Ĝenerale ĝi, havanta pintan kil-karenon, estis rapida kaj stabila. Ĝi havis 10-20 julojn, 4-6 mastojn, hermetikajn holdojn kaj 50-100 kajutojn en kvar etaĝoj. La tiamaj ŝipoj estis gviditaj per kompasoj, kio estis la plej frua en la monda navigado. Poste, kompasoj enkondukiĝis en la Okcidenton kaj


ludis gravan rolon en la monda oceana navigado kaj la "eltrovo de Ameriko".


En Ĵuan-dinastio (1271-1368 p.K.) oni heredis la ŝipkonstruan teknikon de Song-dinastio kaj multe akcelis sian internacian komercadon. Marko Polo, veninta de Italio al Ĉinio, notis, ke en la haveno Ĉjüangou la mastoj staris arbore, tie ankris pli ol duono de la tiamaj mondaj gigantaj komercŝipoj. En 1974 oni

Antikva pirogo



Testudŝela ŝipo





Regalo al gastoj per bongusta manĝaĵo

Korban-festo de ujuguroj


Fotoj de ĈJU ŬEJBO

Ujuguraj infanoj en la festo



La mastro lavas la manojn al gastoj laŭ islama etiketo.






*Por aĉeti festajn
necesaĵojn en
ĵiro*

*Ujguroj ŝatas ĉa-
pojn kun deseg-
noj.*



*Festajn bondezi-
rojn al novel-
zino*





Preĝo en moskeo

La uĝuroj de Ŝinĝjang, Ĉinio, kredas islamon. Ĉiujare en Korban-festo la tieaj islamanoj preĝas en moskeoj kaj aŭskultas recitadon de korano far imamo. Iuj arope vizitas

siajn parencojn kaj amikojn. Kaj la gastigantoj regalias ilin per abundaj manĝaĵoj kaj intime interparolas kun ili. Gejunuloj en festaj vestoj dancas kaj kantas en korto aŭ sur placo.

Vizito al parencoj




Balo



EL REALA VIVO DE ĈINIO

Persimona vilaĝo ĉe la piedo de Janŝan-monto

Fotoj de LAŬ BAJ



Persimonoj

Sunumejo sur la tegmento de kamparana domo



Knabinoj ludas per akvo.



En kamparana korto






Juna virino en ripozo


Kun granda ĝojo mi prenis sur min la taskon de nia redakcio kapti per fotoaparato homfigurojn kaj naturajn vidaĵojn por raporti al niaj legantoj la realan vivon de la ĉina popolo.

Reveno post rikolto de persimonoj





Jen persimonoj de mia familio!





Kamparana domo kaj ŝtonplata tegmento


Sur vojeto



Vilaĝaj infanoj

En la pasinta oktobro ĉie videblis orangkoloraj persimonoj sur arboj ĉe la piedo de Janŝan-monto en antaŭurbo de Pekino. Mi iris laŭ vojeto kaj venis en persimonan vilaĝon. Mi eksentis min kvazaŭ en ŝtona mondo. Ĝi estis tipa montvilaĝo en norda Ĉinio: la muroj el rulŝtonoj, vojoj el gruzoj, domoj el ŝtonpla-





Kontistoj servantaj al kamparanoj

toj kaj pordoj kaj fenestroj el ligno kun antikvecaj skulptaĵoj. Mi tuj fotis tion. Mi daŭre iris antaŭen kaj vidis, ke apud vojo ripozas juna virino. Mi tuj kodakis ŝin. "Nenio fotinda! La foto de montano ne estas okulplaĉa!" ŝi ekridis, kaj ŝia rido montris ŝian honestecon kaj bonkorecon. Ŝi diris al mi: "Per-

simono en aŭtuno dolĉas kiel mielo. Ĉi-jare nia vilaĝo rikoltos ĉ. 350 000 kilogramojn da persimonoj kaj ankaŭ multajn aliajn fruktojn. Ĉiu familio enspezos almenaŭ mil ĵanojn kaj multe pli riĉiĝos ol antaŭe." Ŝi diris ankaŭ, ke en la vilaĝo estas aĉetejo, kiu okupiĝas pri sia afero.

Aĉetejo de persimonoj





Oni ĉerpas akvon el 50-80 metrojn profunda puto por trinki kaj irigacii.



Saharo

SUN ŜINGŬEN:

Afriko batalas kontraŭ dezertiĝo

En la lastaj jaroj ekonomia malfacilo aperis en afrikaj landoj. La sabla katastrofo de Saharo kaŭzis seriozan damaĝon al la agrikultura produktado de afrikaj landoj. Nun ili streĉas la batalon kontraŭ la agrara dezertiĝo. Tio vekis internacian atenton kaj ricevis helpon de la aliaj kontinentoj.

Saharo situas en la norda Afriko kaj konsistigas 1/3 de la totala areo de tiu kontinento. La kontinua trosekeco senĉese ekspansiiĝas la dezerton. Saharo etendiĝas suden ĉ. 10 km. ĉiujare. Ĝi jam kovris 410 milionojn da hektaroj da agroj. Nun la regiono Shabel ĉiujare perdas 1.5 milionojn da

hektaroj da agroj. En la vasta stepo, kie migris nomadoj en la pasinteco, nun regas tomba silento. Tie malprosperas vegetaĵoj kaj preskaŭ ĉie vidiĝas bestaj kadavroj. Ni prenu Malion kiel ekzemplon. Ĝi estis honorita antaŭe kiel grenejo de la okcidenta Afriko. Sed nun ĝia jara produktokvanto de greno malleviĝas je centmiloj da tunoj. Ankaŭ en Malio mankas greno. Pli serioza stato vidiĝas en aliaj afrikaj landoj.

Multaj afrikaj landoj akiris evidentan sukceson en la batalo kontraŭ dezertiĝo kaj akumulis valorajn spertojn tiufланke.

Antaŭ ĉio ili kulturis arbojn. En tio tre okulfrapajn sukcesojn atingis Alĝerio. 84% de ĝia teritorio estas kovritaj de dezerto kaj 1.3% de ĝia teritorio estas kovritaj de arbaro. Pro senĉesa norden-ekspansiiĝo de la dezerto, la norda parto de Alĝerio, kie kuŝas 2/3 de ĝiaj agroj, estas minacataj de sabla vento kaj dezertiĝo. Por bridi la pluapŝan dezertiĝon de agroj la Alĝeria registaro jaron post jaro pliiĝas investon kaj plenenergie mobilizas la popolon en la arbarizado. Alĝeriaj ĵurnaloj raportis, ke de 1962 ĝis 1982 Alĝerio arbarizis 560 000 hektarojn da kampoj, tiel aperis larĝa kaj prospera forstozono.

Konstrui kanalon, fosi puton kaj energie fari akvoutiligan konstruadon estas rimedoj multe alprenataj de afrikaj landoj en la batalo kontraŭ dezertiĝo. En la sudorienta Tunizio sin trovas 80% de ĝiaj mandarinaj ĝardenoj. La loko, frontanta kontraŭ la vasta dezerto, estas ofte minacata de trosekeco kaj malprosperis multaj tiaj ĝardenoj pro atako de sabla vento. La tunizia registaro entreprenas projekton konstrui akvorezervejojn kaj kanalan reton por konduki akvon de okcidente orienten. Ĝia ĉefa kanalo Medĝerdah-Crp bon 120 km. longa estis transdonita al uzado en 1984. Senegalio, Maŭritanio kaj Malio kune fondis organizon por ekspluati la riveron Senegalo kaj en 1979 komencis konstrui la grandan digon Dirmma. La senegalia registaro helpas pli ol 300 grandajn vilaĝojn solvi la problemon pri trinkakvo kaj irigacio. De 1969 ĝis 1985 la kulturata areo de Maŭritanio malpliigis je 60% pro la senĉesa etendiĝo de la dezerto kaj ĝia grena produktokvanto povas kontentigi nur 6% de la ŝtata bezono. Ĝiaj brutoj malpliigis duone, preskaŭ neniiĝis leonoj kaj elefantoj en la

plej suda regiono kaj ĉie videblas bestaj skeletoj. Nun la maŭritania registaro petas helpon de la internacia socio kaj samtempe alvokas sian popolon disvolvi produktadon per siaj propraj fortoj por savi sin mem. Ĝi decidis asigni 16 milionojn da usonaj dolaroj por konstrui akvoprovizajn kaj irigaciajn instalaĵojn en la serioze dezerta regiono. La malia registaro ellaboris proksiman, mezan kaj perspektivan planojn pri regado de la akvofontoj kaj decidis plenforte konstrui digojn kaj akvorezervejojn kaj reformi la irigacian sistemon, samtempe ĝi mobilizas la popolon en arbarizado kaj batalas kontraŭ bruligo de herboj kaj arbitra arbohakado por protekti la ekologian ekvilibron.

La tria metodo alprenata de afrikaj landoj en la batalo kontraŭ dezertiĝo estas koncentri fortojn por konstrui kultivan regionon. En Niĝerlando 2/3 de la teritorio estas dezerto. Tie la klimato estas varma, vento ofta kaj pluvo malabunda, kio estigis trosekecon. Dum la lastaj pli ol 10 jaroj la niĝeriaj registaro kaj popolo venkis multajn malfacilojn kaj konstruis unu post alia

kultivajn regionojn, utiligante la akvon el la rivero Niĝero, kiuj garantias rikolton eĉ en sekegaj jaroj. Nun Niĝerlando ĉe la rando de Saharo fundamente realigis grenan memprovizadon. Tiu miraklo rikoltis internacian aplaudon.

Por pli efike disvolvi batalon kontraŭ la agrara dezertiĝo, la afrikaj landoj sude kaj norde de Saharo faras aktivan interregionan kunlaboron. Ili opinias, ke la batalo kontraŭ dezertiĝo bezonas mobilizon de iliaj popoloj kaj disvolvon de la interregiona kunlaboro. En la dua duono de 1984 kunvenis en Dakaro ministroj de pli ol 20 landoj sude kaj norde de Saharo. La kunveno prezentis serion da proponoj kaj decidis fondi komitaton por reguligi la kontraŭdezertiĝan batalon de la koncernaj landoj, fondi komunan fonduson, ellabori planon de interregiona kunlaboro pri akvo-kaj grund-konservado kaj disvastigo de gresejoj. Nun energie laboras la Konstanta Komitato de la Shahel-regionaj Landoj pri la Kontraŭsekegeca Batalo kaj disvolviĝas la internacia batalo kontraŭ la agrara dezertiĝo tra Afriko.




Strato de Ghardaia ĉe la rando de Saharo



Kolektado de daktiloj en Saharo en suda Alĝerio



En 1986



la 71-a Universala Kongreso de Esperanto
okazos en Pekino!

Ĉu vin interesas la bela orienta antikva lando?

Jen ni rekomendas al vi:

40 VIDINDAJ LOKOJ EN ĈINIO

Tiu ĉi libro konigas al vi 40 plej famajn kaj facile viziteblajn vidindajn lokojn, inkluzive de la Granda Muro, la Malpermesita Urbo, la enterigita terakota legio ktp. Krom la priskribojn pri la pejzaĝoj vi legos ankaŭ interesajn legendojn kaj popolrakontojn pri tiuj lokoj. Kun koloraj fotoj kaj pentraĵoj.

Formato: 119×185mm. 272pĝ. Prezo: £1,90 US\$3,90

Numero: 12-Es-1825P

PITOREŜKA PEKINO

La libro kun mapo, pentraĵoj kaj koloraj fotoj, konigas al vi dek naŭ vidindejojn en Pekino.

Formato: 132×186mm. 74pĝ. Prezo: £0,95 US\$2,00

Numero: 17-Es-1827P

Dek Ses Urboj de Ĉinio

Ĝenerala skizo de 16 ĉinaj grandaj urboj, inkluzive de la ĉefurbo Pekino, industria kaj komerca urbo Ŝanhajo, fama historia urbo Ŝji'an ktp. Kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj.

Formato: 119×185mm. 176pĝ. Prezo: £1,90 US\$3,90

Numero: 17-Es-1885P

Eldonitaj de la ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

Mendu ĉe: Libroservo de UEA

Perantoj de EPC

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

我 参 加 世 界 语 大 会

Mi Partoprenas en la Kongreso de Esperanto

Ofte uzataj vortoj

您几号到北京

七月二十五日下午三点钟

参加第七十一届国际
世界语大会

您一开完会就回国吗

我想游览中国的名胜和古迹

您去哪些地方

nín jìhào dào Běijīng

qīyuè èrshíwǔrì xiàwǔ sāndiǎn-
zhōngcānjiā dì Qīshíyī jiè Guójì Shì-
jièyǔ Dàhuì

nín yī kāiwán huì jiù huíguó ma

wǒ xiǎng yóulǎn Zhōngguó de
míngshèng hé gǔjī

nín qù nǎxiē dìfang

en kiu dato vi atingis Pekinon
la trian posttagmeze de la 25-a
de julio

partopreni en la 71-a UK

ĉu vi revenos al via lando tuj
post la kongresomi volas viziti famajn vidindajn
lokojn kaj historiajn res-
tajojn de Ĉinio

al kiuj lokoj vi iros

Dialogo

A: 鲍尔先生, 您是几号到北京的?

Pekin-

A: Bàoěr xiānsheng, nín shì jìhào dào Běi-
jīng de?A: En kiu dato vi atingis Pekinon, sinjoro
Paŭlo?

Paŭlo sinjor-, vi est- kiom tag- ating-

B: 七月二十五日下午三点钟。

AMUZO

ABSURDE (Humuraĵo)

Iu aŭdis la vorton absurdo, kiu plaĉis al li, kaj li foje refoje ĝin murmuris. Foje pro hasta ŝipveturo li forgesis la vorton kaj serĉis ĝin surboate tie kaj ĉi tie.

La boatisto diris kun miro: "Absurde! Ĉu ankaŭ vorto povas perdiĝi?"

Tion aŭdinte, la homo ekĝojis: "Ha, vi trovis, kial vi ne diris tion al mi pli frue! Vidu, kiom maltrankvila mi estas!"

NASKIĜTAGO (Humuraĵo)

Nepo demandis sian avon: "Aveto, kial hodiaŭ ni manĝas torton?"

"Hodiaŭ estas mia naskiĝtago," respondis la avo.

"Kio estas naskiĝtago?"

"Ĝi estas tago, en kiu mi naskiĝis."

Tion aŭdinte, la nepo larĝe malfermis siajn okulojn kaj demandis: "Ho, kiel vi fariĝis tiel maljuna, se vi naskiĝis hodiaŭ?!"

$$\begin{array}{r}
 \square \quad 5 \\
 3 \quad \square \\
 + \square \quad 7 \\
 \hline
 \square \quad \square \\
 + \quad \square \\
 \hline
 1 \quad 0 \quad 0
 \end{array}$$

CENTIĜO PER PLENIGO
DE BLANKOJ (Cifera Ludo)

Se oni adicias la ciferojn 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9 laŭ la natura ordo oni ricevos la sumon 45. Se oni lerte aranĝas la ciferojn alimaniere, la ricevita sumo estos 100. Jen bone aranĝita estas la formulo kaj plenigu la aliajn 6 ciferojn en la blankoj por ricevi la sumon 100.

(Solve trovebla en ĉi numero)

ENIGMOJ

1. Io havas longan kolon, elstarajn ventron kaj postaĵon. Sur ĝia kolo kroĉiĝas 1' oreloj. Se ĝi kantas ne takte, tordu vi ĝiajn orelojn. (Muzikilo)

2. Post domo kreskas herbo, sur kiu perloj brilas. Mi nenion de ĝi rikoltas kaj ankaŭ vi tion vane faras. (Natura fenomeno)

(Solvej troveblaj en ĉi numero)

B: Qiyuè èrshíwǔrì xiàwǔ sāndiǎnzhōng.
sep monat- dudek kvin tag- posttagmez-
tria hor-

B: La trian posttagmeze de la 25-a de julio.

A: 您是来参加第七十一届国际世界语大会
吗?

A: Nín shì lái cānjiā dì Qīshíyī jiè Guójì
Shìjièyǔ dàhuì ma?
vi est- ven- partopren- 71-a UK ĉu

A: Ĉu vi venis por partopreni en la 71-a UK?

B: 是。

B: Shi.
jes

B: Jes.

A: 您一开完会就回国吗?

A: Nín yī kāiwán huì jiù huíguó ma?
vi tuj post kongres- reven- land- ĉu

A: Ĉu vi revenos al via lando tuj post la
kongreso?

B: 不, 我想游览中国的名胜和古迹。

B: Bù, wǒ xiǎng yóulǎn Zhōngguó de míng-
shèng hé gǔjī.
ne, mi vol- vizit- ĉin- fam- lok- kaj
histori- restaĵ-

B: Ne. Mi volas viziti famajn vidindajn
lokojn kaj historiajn restaĵojn de Ĉinio.

A: 您想去哪些地方?

A: Nín xiǎng qù nǎxiē dìfang?
vi vol- ir- kiuj lok-

A: Al kiuj lokoj vi volas iri?

B: 西安、洛阳、杭州和桂林。

B: Xiān, Luòyáng, Hángzhōu hé Guilín.
Ŝjian, Lǔojang, Hanggōu kaj Gujlin

B: Al Ŝjian, Lǔojang, Hanggōu kaj Gujlin.

Klarigoj:

1. 日期和时间: En la ĉina lingvo oni esprimas tempon kutime laŭ jena vortordo: jaro, monato, tago, horo, minuto kaj sekundo. Ekz. 一九八六年七月二十八日九时二十分十五秒。

2. 几号: 号 kaj 日 signifas iun tagon de monato. Oni ofte uzas 号 en parolo kaj 日 en skribo. La nedefinita nombro 几 estas uzata en demanda frazo.

3. 第七十一届国际世界语大会: En la ĉina lingvo oni metas la prefikson 第 antaŭ la bazajn numeralojn por fari ordajn numeralojn. Ekz. 第一, 第一百二十四. Kelkfoje oni ne uzas 第 por esprimi ordajn numeralojn. Ekz. 二楼 (dua etaĝo), 三班 (tria grupo), kiuj egalas al 第二层楼, 第三班.

4. 一.....就: Kiam — kaj 就 estas tiel uzataj, ili signifas, ke la lasta ago okazas tuj post la unua.

Bronza kruĉo kun ora inkrustaĵo

Foto de LŬO ŬENFA

La bronza kruĉo kun ora inkrustaĵo, elterigita en Ĝjangsu-provinco en 1982, estas alta je 24 centimetroj, kun kalibro de 12.8 centimetroj. Ĝi, artisme farita, havas umeflorojn kiel ĉefajn desegnaĵojn. Nun ĝi konserviĝas en la Nankina Muzeo, kaj post ekspertizo oni konstatis, ke ĝi estis objekto de la periodo de Militantaj Regnoj (475 a.K. —

221 a.K.).

La kruĉo havas grandan aper-turon, enkaviĝintan kolon, ŝvelan ventron kaj platan fundon kun malalta randa piedo. Ĝia kolo estas inkrustita per ora ornamaĵo. Ĝiaj ŝultro kaj ventro estas garnitaj per bronzaĵaj aĵuroj en formo de interligitaj senkornaj drakoj kaj kun disvolviĝantaj umefloroj. Ĝia ventro portas horizontalan

zonon inkrustitan per ora ornamaĵo, kun kvar ringoj kaj kvar bestoj. Ĝia piedo estas inkrustita per verda romba ornamaĵo. Ĉe la rando de ĝia aperturo estas gravuritaj 11 ideogramoj montrantaj la numeron, nomon kaj volumenon de la kruĉo. Ĉe la rando de ĝia piedo estas gravuritaj pli ol 20 ideogramoj apenaŭ koneblaj.



Bronza kruĉo kun ora inkrustaĵo farita en la periodo de Militantaj Regnoj

